JANUARO/FEBRUARO/MARTO 1988

75

(93)

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero: 7 FF. Abono por 1988 kun adresaro: 35 FF.

Pĉk: 3371 74 M BORDEAUX, Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque

**************************************************************************

# REVO

Homoj estas similaj al aktoroj, kiuj estus ĉiuj sur unu scenejo. Sed neniu scias, kiun teatraĵon oni ludu. Eĉ ne estas sciate, ĉu temos pri farso aŭ pri tragedio. Iuj asertas :"Mi konas persone la aŭtoron de la teatraĵo, jen la teksto ludenda." Kaj ili proponas, ĉu la Biblion, ĉu la Koranon, ĉu la Kapitalon, ĉu aliajn piajn librojn. Iuj eĉ proponas tekstojn, kiujn videble ili mem ne legis. Kaj ili minacas eligi el la scenejo ĉiujn, kiuj ne konsentas kun la teksto, kiun ili proponas. Iuj bonvolas ludi iun ajn tekston, kondiĉe, ke ĝi estu en iu lingvo. Kaj ili disputas pri la elektenda teksto, kaj pri la lingvo, en kiu oni ĝin ludu. Iuj, timigitaj de tiu bruo, sin izolas en angulo de la scenejo por tie verki poemojn foje altvalorajn, sen zorgi pri la najbaroj. Iuj diras : "Ba, ĉu gravas, kion ni ludu ? Post kvin minutoj falos la kurteno."

Mi proponas, ke ĉiuj silentu dum momento, sidiĝu ronde, kaj ke ĉiu esprimu, kiun rolon li aŭ ŝi mem deziras ludi. Kaj poste, oni provu kolektive krei artaĵon (se eblas, komedion) surbaze de ĉies deziroj. Ĉu realigebla estas tiu propono ? Ĉu ĝi estas nur revo ?

Bedaŭrinde, iuj suspektas min pri la kaŝita intenco trudi al ĉiuj mian propran tekston.

Do ĉu finfine el tiu ĥaoso eliros harmonio ?

Jakelino

## LASTA EL LA UNUAJ

*Ofte miaj "vortoj" konsistas el nekrologo. Estas specialaĵo de la multjaraj aĝoj, ke oni vidas, unu post alia, siajn amikojn forpasi.*

*La 30an de novembro 1987 mortis Norbert Barthelmess, 90-jara, kiu post Piron, Bannier kaj Glodino, restis la lasta el la unuaj kompanoj de Lanti, la fondintoj de SAT.*

*Mi lin ekkonis ĉe la Laborborso en Parizo, okaze de kunvenoj de la loka grupo de FEO (Laborista esperanto-federacio), antaŭ pli ol duonjarcento. Mi revidis lin en kongresoj de SAT kaj de SAT-Amikaro, kaj, post kiam mi forlasis Parizon, ĉiufoje, kiam mi vizitis la SAT-sidejon. Tie ĉiam sidis kaj deĵoris la fidela duopo Bannier-Barthelmess, ĉiam afable je dispono al la vizitantoj, ĉiam diligente laborantaj.*

*Barthelmess, la tradukinto de **Faŭsto**, estis homo de vasta kaj profunda kulturo. Amanto de klasika muziko, li bele ludis pianon. Naskite en germanlingva Rejnlando, li parolis la francan lingvon tiel flue kaj ĝuste kiel sian gepatran idiomon, kaj li estis beletra spertulo. Kredeble li estis kapabla fari al si elstaran nomon en la germana kiel en la esperanta literaturo. Sed li dediĉis sian tutan tempon, sian tutan aktivecon, sian tutan vivon al esperanto kaj al SAT. Longatempe li portadis sur siaj ŝultroj la ĉefredaktadon de **Sennaciulo**, kaj ĝis la fino tiun de **Sennacieca Revuo**, kiu estas ŝatata ne nur inter SAT-anoj, sed en la tuta esperantistaro.*

*Tiaj sengloraj sed utilegaj taskoj tute okupadis lin. Lia aktiveco estis komparebla kun tiu de Bleier Vilmos en Budapeŝto dum la brila epoko de **Literatura Mondo**.*

*Kutime post ies morto oni eltrovas en tiu altajn moralajn ecojn. Pri Barthelmess ni ne bezonas elvoki tiun kutimon. Lia natura afableco ne estis nur formala ĝentileco: lia toleremo estis egala al la firmeco neŝancelebla de liaj konvinkoj.*

*Ne longe plu vivos ni, liaj samgeneracianoj. Sed mi estas certa, ke multaj pli junaj konservados dum longaj jaroj la karan memoron pri nia amiko Norbert.*

***Valo***

---

**N.d.l.r. :** Por iom pli scii pri Norbert Barthelmess, restas disponeblaj ĉe SAT-Broŝurservo kelkaj dekoj da ekzempleroj de:

**N. BARTELMES * Mia vivo * Artikolaro * Poemaro**
(Aŭtobiografio, elekto el 10 artikoloj aperintaj en **Sennaciulo**, kaj kolekto da liaj poemoj - 92 paĝoj, 10 FF)



## LA "KRIZO" : KIU ELIREJO ?



(pli kaj pli malheliĝas la horizonto.)

**J.G.:**

Antaŭ kelkaj monatoj okazis, laŭ iniciato de genetikisto Albert JACQUARD (Jam aperis artikolo de li en L!) kolokvo, kiu kunigis diversajn sciencistojn: biologon, ekonomikiston, sociologon, fizikiston el la sistemisma skolo.

Tiu skolo baziĝas laŭ la sekvaj punktoj:

- Interrilato de la fenomenoj: sciencaj, ekonomiaj, filozofiaj, sociaj.
- Organizado de la Mondo, laŭ sistemoj, de la ĉelo ĝis la kosmo, hierarkiaj kaj interagantaj.
- Kompleksecо de la realo kaj de la Universo, kiuj funkcias laŭ la leĝoj de probableco.
- La sistemo estas pli ol la tuto de la partoj, ĝi estas io nova.

Dum la lasta jarcento kaj ĝis nun, oni eksplikis, ke la leĝo, kiu regas la mondon, estas la determinismo laŭ la fizikistoj Laplace kaj Newton. La Mondo estas nemovebla, ĉio estas determinita laŭ mekanikaj leĝoj forpelantaj la hazardon. Ekzemple: "la horloĝo de Kartezio".

Poste aperis alia koncepto: <u>la entropio</u>. La Mondo iras al diseriĝo kaj al morto fatale. "La Mondo komenciĝis sen la homo kaj finiĝos sen li. Ni estas sur la tero hazarde en mondo, kiu iras al sia morto" (Levi-Strauss)

La Mondo estas tio, kio ĝi devas esti kaj morgaŭ estos tio, kio ĝi devos esti (unuflanka evoluado de A ĝis B). Sed fizikistoj eltrovis, ke se oni metas gason en tute fermitan ujon sed kun du apartaĵoj kiuj interkomunikas, la molekuloj iras de unu ĝis la alia sen determinita ordo.




Kemiisto Prigogin (Nobelpremio) elmontris, ke la molekuloj povas disiĝi el la leĝo de la meznombro (dispelaj

molekuloj). La determinismo ekzistas, sed ĝi ne estas absoluta, nur relativa. Estas ero da libereco en la naturo kaj ĉe la homo.

La Homo povas agi en la historio. Li ne plu estas nura spektanto sed aktoro. La hodiaŭo ne tute entenas la morgaŭon. Ekzistas kritikaj punktoj (malekvilibraj situacioj), kie la Mondo povas ŝanĝiĝi. De la jaroj 1970 la Mondo estas en iu el tiuj periodoj.

Laŭ la partoprenantoj de la kolokvo, la malnovaj skemoj: ekonomiaj, politikaj, kulturaj, ne plu kongruas kun la nuna mutacio. Sed la strukturoj kaj la mensoj konservas la malnovan, meĥanisman kaj determinisman ideologion. La Ekonomio laŭ la merkata leĝo ne plu funkcias: laboro, salajroj, produktado ne plu estas ligitaj. Pli kaj pli la necesa laboro, la produktado de varoj, la ebleco ilin aĉeti, ne plu interrespondas. Milionoj da senlaboruloj, konsumproduktoj, malsatantoj, ekzistas samtempe, ne kiel provizora krizo (kiel antaŭe) sed kiel struktura fenomeno. Oni retrovos nek la plenan laboron nek la senfinan kreskadon en niaj okcidentaj landoj kaj la malsatantoj de la Tria Mondo ne povas aĉeti la varojn, kiuj troplenigas la silojn kaj la fridoŝrankojn en Eŭropo. Necesas kultura rompigo: la laboro ne plu povas esti la nura bazo de la vivo.

Pli kaj pli la maŝinoj anstataŭas la homojn (informadiko kaj robotiko). Oni povas reprodukti preskaŭ senpage varojn (traktado de tekstoj, ktp).

La socio de la jaroj 1945-1975 estis bazita laŭ la senfina kreskado de la Nacia Kruda Produkto, la bezono je amaso da laboristoj, la kvanto anstataŭ la bona kvalito, la valorigo de la konkurado, la hierarkio de valoroj. La Mondo estis regata de Okcidento, plenkreskula, vira, kun superregado de la Blankuloj.

Tiu situacio malekvilibriĝas. Oni vidas elŝpruci novajn valorojn: rolo de la virinoj, aliaj konceptoj pri laboro, socio plurrasa. Sed la malnovaj strukturoj rezistas kaj la mensoj ne evoluas sufiĉe rapide.

Laŭ genetikisto Jacquard kaj lia skipo oni povas antaŭvidi kvar eblajn elirojn:

Unue: La Nuklea Vintro post eksplodo de atombombo (sendube akcidente).

Due: Grava alfronto kun la Tria Mondo, kiu ne plu konsentos la netolereblan situacion kaj reagos kontraŭ la riĉaj landoj per terorismo, invado...

Trie: Aranĝo de la sistemo dum ankoraŭ kelkaj jaroj, iom da helpo al la Tria Mondo, al la senlaboruloj, por eviti socian eksplodon, sed tio ne povos daŭri longe, ĉar oni iras al dueca socio: malplimulto, kiu havos laboron kaj povon, kaj plimulto pli kaj pli malriĉa kaj marĝena. Ni estas en rompiga periodo.

Kvare: Aŭ la katastrofo laŭ unu el la tri unuaj scenaroj, aŭ kompleta transformiĝo de la socio, kiu irus al alia moderneco, kiu kapablus regi tiun novan kompleksecon kaj inventus novajn formojn: ekonomiajn, sociajn, kulturajn. Revolucio sen perdantoj: novaj manieroj produkti kaj disdoni, anstataŭigo de la hierarkio de valoro per hierarkio de funkcio.

Jen la veto, kiun proponas la sistemismaj pensuloj, sed ĉu la homoj estos sufiĉe saĝaj por aŭskulti kaj pripensi novajn ideojn kaj agojn antaŭ la ebla katastrofo?

Pri tiu temo oni povas legi en la franca: **Albert Jacquard:** "Cinq milliards d'hommes dans un vaisseau".

***Jean-Claude:***

*Legante la alportaĵon de J.G., mi tuj pensis pri la frazo de Einstein: "Se la homaro volas plu vivi, ĝi ŝanĝu sian pensmanieron..."*

*Kiel do eliri? Pri tio mi ne havas solvon, sed nur etan ideon pri la kondiĉoj ĝin ebligontaj.*

*Kiu ajn estos la sistemo proponita, ĝia sukceso laste dependos de ĉies sinteno. Tio rekte nin kondukas al etiko kaj homaj rilatoj, do al eduko kaj sekve al "vin konu mem" de la iamaj grekoj.*

*La laboro devas esti rimedo je la servo de edukado kaj ne la malo, kiel nun estas.*

*Eduki, laŭ la etimologio, estas "konduki ekster". Tio signifas ne nur lerni, sed ankaŭ esprimi laŭ la propraj ebloj, kaj fari malkovrojn. Al tia liberiĝo sopiras ĉiu homo.*

*La kontentigo de tiuj fundamentaj postuloj ebligos, ke la homo akceptos labori "sen profita celo", ke laboro estos nur socia servo.*

*Tamen, por ke la persona transformiĝo estu vere firma, ĉiu devas vidi "kiu mi estas?", laŭ la fama demando. Neglekti tiun punkton kondukus pli-malpli frue al certa fiasko de la plej bona sistemo.*

*Pri ĉio tio homoj tra la jarcentoj jam pensis kaj sukcese eksperimentis.*

*Do, kiel konvinki, ĉu eĉ eblas konvinki?*

*Al tio, laŭ mi, helpos la situacio mem. Kaj necesas informi, konigi, senlace.*

**GAROLO:**

Kiu ajn, ankoraŭ pensanta homo, plene konsentos kun la prezentitaj formoj de "krizo" de Albert Jacquard kaj aliaj, kaj laŭ la enkonduko de J.G. Ankaŭ la eliroj (katastrofaj) estas nuraj konsekvencoj de tiu krizo. Mi mem, komuna terano, jam longe pensis kaj skribis pri tio*. Sendube, pensi kaj skribi ne sufiĉas... Mankas la saviĝaj agoj.

La saviĝaj agoj mankas pro du fundamentaj motivoj. La unua, kiel la sciencistoj pli-malpli tion diras en la kolokvo, estas, ke la homaro evoluis laŭ teknologio kaj absolute stagnis laŭ etiko. La homaro konservas la Bibliojn de antaŭ du mil jaroj. La dua, kaj tion la sciencistoj ne diras, ĉar ili mem sin lasis kapti, estas konsekvenco de la unua punkto, la homaro falis sub la regadon de nekredebla mito: la kolektiveco.

Sendube determinismo kaj evoluismo estas relativaj en la natura okazado kaj tute ne danĝeraj kiel doktrinoj kiam la homo ne intervenas. Danĝera estas la konstruiva raciismo, kiam la homoj fiksas al si celojn (kompreneble pro interesoj) kaj uzas kiujn ajn rimedojn por tiujn celojn atingi: la rezulto estas la krizo kun la katastrofaj elirejoj.

Rimarku bone, ke pro la mito: Kolektiveco, oni aludas pri transformiĝo de la socio (do kolektivo), pri novaj manieroj produkti kaj disdoni, pri anstataŭo de valoroj kaj funkcioj, ktp... do, ĉio rilatanta al kolektivo. Neniu parolas pri la nepra kondiĉo de memstareco, memsufiĉeco, de memagado por ĉiu individuo. Ĉiuj depostulas siajn rajtojn el la kolektivo, neniu plu plenumas siajn primarajn devojn. Laŭ mi ĉi tie kuŝas la vera kaŭzo de nia "krizo".

Nedubeble la hordoj de homŝafoj ne nur de la tria mondo, sed ankaŭ de la unua, kiuj estas manipulataj de la elitoj, kie same troviĝas la sciencistoj, kapablas konduki al la katastrofoj. Kiel ekzemplon mi povas citi la "amuzan" katastrofon, kiu okazis en Brazilio en tiuj lastaj tagoj kaj kiun oni jam nomis la brazila Ĉernobilo. Malpli ol 100 gramoj da Cezio-137, kiuj dum jardekoj kuracis malsanulojn per radioterapio, subite mortigas aŭ endanĝerigas la vivon de pli ol trideko da tiuj cititaj ŝafoj. La elituloj (eble unu el milo da homoj) konstruis la genian aparaton. La aliaj homoj en sia nescio, ignoro, kaj kiel instrumento de iu blinda kolektivo, senkonscie detruas la saman aparaton liberigante la radiadon ĝis la lastaj konsekvencoj. Jen la danĝero en krizo.

---

*) Miaj libroj **Satana Anĝelo** kaj **Moderna Mito: la Kolektiveco** estas akireblaj ĉe SAT.



Jes, la edukiĝo, kleriĝo, instruiĝo estas nepre necesaj, ne en kolektiva manipulado, sed en individua konsciiĝo. Sendube, Jean-Claude, la laboro estas io naŭziga, pro la mizera salajro en kapitalismo; ĝi restos same naŭziga kiel socia servo pro la citita mito, kiu kondukas al parazitismo kaj ĉar en la kolektivo la homo restas same instrumento de ekspluatado. La laboro devas esti profito-cela por ĉiu individuo ĉar estas la nura maniero ebligi nian viveltenadon en memstara agado, ankaŭ kaj feliĉe kun la maŝinaj robotoj. La alia solvo estus, ke kolektiva dispozicio, en nazia stilo, mortigu pli ol 4 miliardojn da homoj, tiel ke la restanta malgranda miliardo povu sen streĉo, sen laborado akiri siajn vivbezonaĵojn.

Ni liberiĝu de la mito: kolektiveco, ni plenumu nian devon de homo, ni konstruu nian memsufiĉecon kiel individuo, tiam ni eliros el tiu absurda krizo. Mi kredas, ke ne ekzistas alia vojo kaj ni agu rapide, antaŭ ol estos tro malfrue.

***Suzanne :***

*Laŭ mi, estas neniu racia kaj definitiva solvo por iu ajn problemo - kaj tutcerte ne pri la dungiĝado - tiom longe dum la laboro estas submetata al la kapitalismo, ĉiam celanta maksimuman rentabilitaton.*

*Sed, pro la nuna evoluo de la monda merkato, la kapitalisma sistemo ŝanĝiĝu; tiam, pro la cirkonstancaro, eĉ kontraŭvole, stariĝos la sopirata, humana, frata homsocio...*

*Eĉ <u>ne akcidente</u> la unua eventualaĵo okazus; la mondregantoj estas tiom frenezaj, kaj la plimulto da regatoj tiom senpripensaj.*

**Jean-Christophe PICQUET :**

La temo, enkondukita de J.G. prezentas sufiĉe da malfacilaĵoj por ke ni estu modestaj je ĝia sojlo.

1. Mi diras, ke la situacio pritraktata en ĝi ne prezentiĝas laŭ la sama forto - kaj aspekto - en ĉiuj partoj de la mondo.
Konkrete dirite, mi ne scias ĉu en orientaj landoj tia analizo povus esti uzata.

2. La krizo estas, laŭ mia vidpunkto, tro rapide priskribita. Tamen, mi tute akordiĝas kun la rezonado, kiu montras, ke la socia kaj ekonomia sistemo serĉas - aŭ celas - ekvilibron. Kaj la nuna krizo havas kiel egan karakteron la finon de ekvilibro.

3. Ĉu la krizo estas kaŭzita pro la superregado de kapitalismo? Mi opinias, ke la solvo ne estas tiel facila.

Certe kapitalismo regas okcidenton, sed tiu sistemo montris en la pasinteco sufiĉe da imag-povo por trovi iun ajn solvon. Tiom da homoj anoncas, ke kapitalismo atingis la fal-punkton, ke oni ne plu fidas ilin.

Mi preferus, kune kun la sistemisma skolo analizi la problemon rilate al problemo de ekvilibro.

Sed la nuna krizo havas jenan karakteron, kiu malebligas la eltrovon de solvo:
- novaj aktoroj, kiuj havas povon sur la internacia scenejo;
- novaj soci-vivmanieroj en Okcidento, ekzemple.

Tiuj aktoroj havas alian strategion ol okcidentaj landoj. Grandparto de la konflikto devenas de tio.

Inter la kvar scenaroj prezentitaj en la enkonduko, ĉu ni kapablus konstrui la plej bonan? Mi opinias, ke en niaj ĉiutagaj agadoj ni estas partoj de pligranda decido (en niaj asocioj, urboj...)

La kulturo, pli ol la politiko, helpos nin en la estonteco.

***PAKO :***

*Ĉiuj scias, ke eblas paroli pri du malsamaj krizoj. Tiu de la evoluintaj landoj (alinome okcidento), kiu manifestiĝas de 1973; kaj tiu suferata de la tuta mondo (precipe la tria) de antaŭ multe pli - se ne diri de ĉiam.*

*Nu, ne necesas krei novan filozofion, por ke oni sciu, ke la solvo estas efektiva solidaro. Sed estas stulte pensi, ke tio efektiviĝos per senbrua, paca kaj malviolenta ŝanĝiĝo de la homaj penso kaj socio, des pli kiam oni ne sukcesas apliki tiun solidaron eĉ en okcidento, kie estas multe pli facile, tial ke la marĝenuloj kaj ceteraj krizosuferantoj estas vere malplimultaj. Do estas la subuloj, kiuj devos trudi la ŝanĝon, sed du faktoj igas tion, laŭ mia opinio, neebla:*

*1.- La riĉlandaj marĝenuloj, kiel ilia nomo montras, estas ne sufiĉe multnombraj por revolucio.*

*2.- La riĉaj ŝtatoj estas abunde potencaj por neebligi revolucian elstariĝon de la malriĉaj.*

*Ne endas emfazi pri la unua fakto. Pri la dua mi tamen klarigu ion: La revolucio, kiu povus trudi paŝon principe pli-bonigan, estus kontraŭ la riĉaj ŝtatoj. Paroli pri pollanda socialismo estas stulte, ĉar la eksteraj rilatoj de ĉiuj ŝtatoj, eĉ socialismaj, estas esence kapitalismaj (kaj Argentinio, nome kapitalisma, kaj Polio, nome socialisma, akurate pagas siajn ŝuldojn al la kapitalisma mona monda strukturo). Do starigi socialismon en unu lando, des pli se ĝi povras, estas same kiel starigi socialismon nur en hejmo de proleto, kiu ekstere rilatiĝas kapitalisme.*



*Sed, kiu povas kredi ebla kontraŭokcidentan revolucion, se eĉ Sovetunio frue neglektis la "ĝisvenkan batalon kontraŭ kapitalismo" kaj akceptis la kapitalisman ludon en la eksterlandaj rilatoj?*

*Nu, mi prezentis faktojn kaj opiniojn sed ankoraŭ ne respondis al la demando de J.G.: kiu elirejo el la krizo? Tri solvoj venas en mian kapon:*

*1.- Ĥirurge kuraci: neeble de ekster okcidento kaj neprobable de ties eno.*

*2.- Socialdemokrate panseti: tutmonda apliko de socialdemokrata solidareto.*

*3.- Ne estas krizo. La afrikanoj, azianoj kaj latinamerikanoj ne estas homoj, ni do plu profitu ilian ŝviton.*

*Ni, evoluintlandanoj, nune sekvas ĉi trian vojon, kvankam ja tra hipokrite.*

**O. Jopo :**

Ĉe la televido mi spektis dissendadon, kies titolo estis: "La krizo... kia krizo?" En ĝi, Yves Montand klarigis kun helpo de iu sperta ekonomikisto, ke fakte ne estas krizo, tial ĉar la ekonomio estas bona, la meza vivteno estas ĉiam pli komforta. Li nur forgesis paroli pri la senlaboreco. Laŭ vidpunkto de tiuj, kiuj havas bonajn sociajn postenojn, neniam antaŭe ili havis tiom bonajn vivkondiĉojn. Parolas pri krizo nur tiuj, kiuj suferas maldungitecon, bankroton, malfacilaĵojn por vendi produktaĵojn, aŭ vendi je prezoj pli malaltaj ol la produktokostoj. Ankaŭ la kapitalistoj parolas pri krizo, sed nur ĉar ili ne povas tiom amplekse kreskigi siajn profitojn.

Laŭ mi, por trovi elirejon, necesas koni pri kia krizo oni parolas kaj kial tiu krizo. De kiam la burĝaro ekregis anstataŭ la nobelaro, ĝi starigis novajn ekonomiajn regularojn, ĉefe la liberan cirkuladon de la varoj, la merkatan ekonomion, la konkurencon, la liberan entreprenon. Tiel la interŝanĝoj disvolviĝis, la mastroj perfektigis la produktrimedojn, la produktmetodojn. Kiam la mendoj superis la ofertojn sur la merkato, tiam la vendoprezoj de tiu varo estis profitdonaj. Tiam la kapitalistoj investis en tiu fako, oni kiel eble plej perfektigis la produktadon cele al pli granda kvanto. Sed multaj kapitalistoj havis la saman ideon kaj venis momento kiam la produktado superis la mendojn, la prezoj malaltiĝis ĝis tio, ke la malmodernaj entreprenoj ne plu havis profitojn aŭ eĉ ne plu povis vendi siajn produktaĵojn. Tiam okazis krizo. Tiun krizon oni povis nomi kreskad-krizo. Baldaŭ okazis nova prezekvilibro,

la konsumantoj povis pli bone, pli malkare kontentigi siajn bezonojn, ili disponis monon ankaŭ por novaj bezonoj de komforto, de plezuro. Ankaŭ eblis konkeri novajn merkatojn en landoj, kiuj estis ankoraŭ ne sufiĉe ekipitaj, necesis eĉ investado por ekipi la propran landon. Tiel la kapitalismo okazigis grandan ekonomian disvolviĝon, naskis la grandan industrion, koncentris grandajn kapitalojn. Nun la kapitalismo atingas punkton, kiam, dank'al sciencaj teknikaj eltrovoj, al dispono de grandaj energiofontoj, grandaj spertaj scioj de laboristoj, ĝi povas per malpli da laboristoj produkti pli ol la merkato povas aĉeti. Nun multaj landoj industriiĝas; antaŭe klientoj, ili nun fariĝis konkurantoj. La prezoj de la krudmaterialoj estas malaltaj, ĉar ili abundas. Tio malpliigas la aĉetpovon de tiuj landoj. La senlaboreco malpliigas la aĉetpovon de la enlandanoj. La nuna krizo estas krizo de matureco de strukturo, el kiu oni ne povas eliri per la antaŭaj rimedoj.

La kapitalisma sistemo okazigis grandan evoluon en la socia vivo. Certe, la burĝoj, perfektigante la produktadon, stimulante la komercon, klerigante la laboristojn, amasigante grandan kapitalon, celis unue la profitojn, la potencon, sed (nekonscie) ili konstruis novajn materiajn bazojn, kiuj permesus vivi en bona stato kaj sekuro per malpli da peno. La kelkaj proprietuloj de granda kapitalo proprigis al si la frukton de la laboro, pagante nur por vivteno de la laboristoj. La valoro kreita per la laboro superis tiun elspezitan por la salajroj. Tiu plus-valoro estis profitoj por ili aŭ ebligis doni interezojn al aliaj kapitalistoj. Tiel akumuliĝis ĉiam pli granda kapitalo kaj okazis granda ekspansio. Nun ne plu eblas ekspansio, la kapitalisma sistemo etendiĝas sur la tuta planedo. Oni strebas grandigi la profitojn per pli granda produktiveco, per prunto al la ŝtato, kiu garantias interezon, kiun pagas la impostoj. La ĉefa zorgo estas daŭrigo de la profitoj, sed la produktiveco forpelas laboristojn el la laborlokoj kaj samtempe malpliigas ilian aĉetpovon; la konkurenco sur la eksteraj merkatoj malgrandigas la eksportojn, do ankaŭ pligravigas la krizon. La sinteno, kiu okazigis progreson, estas malhelpo al nova progreso. Se la homaro volas profiti de la akiritaĵoj, ĝi devas ŝanĝi la sistemon, anstataŭ organizi produktadon, interŝanĝon por privataj profitoj, ĝin organizi por bone kontentigi la bezonojn, plibonigi la vivkondiĉojn, racie uzante la sciencajn teknikajn sciojn.

Jam antaŭ longe Marks bone studis kiel disvolviĝas la kapitalisma sistemo kaj al kia neelirebla stadio ĝi atingos. Li skribis:



"Kiam la materiaj produktofortoj de socio atingas apartan stadion en sia evoluo, ili ekkonfliktas kun la ekzistantaj produktorilatoj aŭ, se oni uzas juran esprimon por la sama afero, kun proprietoj, en kiuj ili funkcias. Anstataŭ ankoraŭ servi kiel institucioj por evoluigi la produktofortojn de la socio, tiaj anakronismaj proprietoj ekkatenas la socian produktadon. Ekvenas periodo de socia revolucio."

Mi ĉerpis tiun citaĵon el la broŝureto eldonita de Esperanto Editions Hasting, Anglio (Frank Maitland).

Ŝanĝi fundamente la ekonomian strukturon estas malfacila tasko. Oni kolizias kontraŭ la mensostato de la homoj kutimiĝintaj al la ekzistanta socia ordo, kontraŭ la malfacila elekto de anstataŭa sistemo. Nun la sorto de la plimulto ne estas tiom aĉa kiel ĝi estis en la unua tempo de la kapitalismo, ĝi ne komprenas la necesan solidaron por la suferantoj, ne atentas la danĝeron de milito.

La kapitalismaj ekonomikistoj havas kiel solvojn, pli da produktiveco, pli da ekspansio, pli da eksporto. Ili forgesas, ke per la produktiveco oni forpelas ankaŭ pli da laboristoj el la laborejoj; se oni malpliigas la vendprezojn, okazas, ke en aliaj landoj ili agas same kaj ne eblas akiri pli grandan lokon sur la internacia merkato. Same pri la ekspansio, pri ampleksigo, ĉar la kapitalistoj ne volas investi en fakoj, kiuj ne plu donos profitojn, kaj kies produktaĵoj ne estus eksportebiaj. Tiuj solvoj solvos nenion kaj male, malpliigante la aĉetpovon de la senlaboruloj, oni pli-ampleksigas la krizon. Alia solvo estas ampleksigi la armilproduktadon, la prestiĝajn elspezojn, kiuj donos profitojn. Tio estas malŝparo, fuŝa uzo de krudaĵo kaj energio. Estas danĝero, ke ili estos uzataj por solvi rivalecon aŭ por potencula avido, ambicio, imperiismo. Kien tio finatingos?

La social-reformistoj opinias, ke per kelkaj reformoj (malpli da labortempo, pli bonaj salajroj, socia asekuro por la senlaboruloj aŭ okupo ĉe sociaj laboroj) ili povos malpliigi la krizon. Ili ne vidas neceson ŝanĝi la ekonomian sistemon.

Pri Sovetio? Oni ne povas diri, ke ĝi estas tiom alloga ekzemplo. Unue tie okazis ribelo kontraŭ la milito, la mizero, sed la plimulto ne konsciis kiel ordigi novan sociordon. Tiun trudis kleraj gvidantoj, kiuj poste fariĝis tutpovaj ĝis la persona povo de Stalin. Ankaŭ la sinteno de aliaj landoj pliigis la malfacilaĵojn. Nun ŝajne la lando evoluas. Ĉu ĝi sukcesos?

El la okazintaĵoj en Sovetio oni povas tiri instruon. La ĉefa estas, ke la ĝisnuna taktiko de la revoluciaj partioj ne estas

bona, hodiaŭ eĉ pli ol antaŭe. Tiel ili subtenas la depostulantajn laboristojn, promesante ke la socialista povo solvos ĉiujn problemojn. Ni vidas, ke en Sovetio ili frontis al malfacile solveblaj problemoj. Oni povas disdoni ne pli ol kio estas disponebla. Ankaŭ por efektivigi grandajn realigaĵojn, por tion financi, necesas akumuli kapitalon, kaj tio ne eblas, se oni disdonas ĉion por la konsumado. La diferenco estas nur, ke tiu kapitalo fariĝas proprumo de la socio, kiu povas elekti la farotaĵojn. En lando, kiu bezonis multajn ekipaĵarojn, necesis granda parto de la enspezo, do ŝpari la disdonadon. Tiu sinteno necesis por prepari pli bonan estontecon. Bedaŭrinde, en Sovetio la povo kaj burokrataro trudis tion en mallibero, sen demokrata partopreno de la amaso.

Nun en la okcidentaj landoj la revoluciaj (?) partioj demagogie subtenas ĉiujn depostulojn de la laboristaro aŭ kamparanoj. Tamen en tiuj landoj la mezranguloj havas sufiĉe bonan vivtenon kaj la altranguloj tre bonan. Verŝajne ne eblos ankoraŭ ĝin plibonigi. Necesas paroli vere kaj ne fari falsajn promesojn. Ĉu vere ili celas atingi la komunistan celon ("socio sen ekspluatantoj kaj ekspluatatoj") kaj fine komunistan socion, kiu povos skribi sur siaj flagoj "de ĉiu laŭ ties eblecoj, al ĉiu laŭ ties bezonoj"?

La anarkistoj celas socion bazitan sur granda libero, asocioj, komunumoj, kiuj libere federiĝos. En ĝi ne estos trudema povo, ĉiuj estos konsciaj pri siaj devoj pri solidaro. Laŭ mi, tiu socio estus ideala, sed postulus, ke ĉiuj estu perfektaj homoj aŭ almenaŭ la granda plimulto. Ĉu ni atingos tiun punkton?

Mi vidas en la proponoj de J. Duboin (disdona ekonomio), Majoro C.H. Douglas (Socikredito), Bellamy, multajn bonajn ideojn aŭ almenaŭ principojn, kiuj povos gvidi por antaŭvidi kiel devos esti nova socia strukturo, socio, en kiu estus pli da egaleco, pli da fakta partopreno de ĉiuj en elekto de organizado, pli da sekureco, pli da justeco, pli bona uzo de ĉiuj akiritaj progresoj de sciencoj, teknikoj, konoj, scioj, por ĉies feliĉo.

Eble necesas transira stadio. Unue, malpliigi la diferencojn, progresigante nur la malgrandajn enspezojn, certigante al ĉiuj enspezojn. Organizi la necesan laboron, tiel ke ĉiuj kapabluloj havu grandan eblecon partopreni. Uzi la eblecon, kiun donas la produktiveco, ekzemple, por plibonigi, plibeligi la vivmedion, daŭrigi produktadon, kiu postulas sciojn, lertecon. Pli atenti al ekologio, ne fuŝi la naturon. Ĉu povos fariĝi plimulto por okazigi tiun grandan ŝanĝon, ŝanĝon ankaŭ en la pensmaniero?



**GBEGLO Koffi (Togolando) :**

## La adiaŭa nokto

*Estis malseketa nokto. La vespero estis malvarmeta. Tiam IFOK devis kuŝi jam je la 18a horo en sia kanapo, ripozante. La vespermanĝo jam okazis duonhoron antaŭe kaj en la domo tiam devis regi la silento. La palpebroj de IFOK fariĝis pli pezaj kaj dormeto akaparis lian konscion, li estis for de sia korpo.*

*Unue, bonvenon; poste, ĉu vi fartas bone? Kaj fine, kie estas via edzo? IFOK devis tiam iel sonĝi, sed tio estis malsonĝo. En sia ekstazo, li aŭdetis ANIT ridanta pro ŝercoj de sia frato KOIF. Tiu amuziga interparolado devis daŭri ĉirkaŭ unu horon. Kaj poste, "Ŭoŭo, KOIF salutas vin per mi," li venis kaj jam foriras, ne volante ĝeni vian dormon, li lasis salutvortojn por vi, ĉu vi aŭskultas?". Neniu respondo venis el la buŝo de IFOK, ĉar la labortago estis tre laciga kaj, kiel kutime, lia revigliga kanapo estis ripoziganta lin.*

*IV'ANIT, ĉu vi fartas bone? Kie estas via edzo? Tiuj vortoj venis al IFOK tiam duondormanta. Tuj ANIT devis eniri la ĉambron por elĉambrigi seĝon. Ŝin vizitis la edzino de ŝia frato. Respektante la ripozon de la edzo, la vizitato kaj la vizitanto mallaŭtigis sian voĉon. Kiel dormiga muziko por IFOK, kiu devis tiam profundigi sian dormon.*

*Ŭoŭo! Ŭoŭo! Vekiĝu por malfunkciigi la televidilon, la elsendoj jam ĉesis. Ĉe tiuj vortoj, IFOK eksaltis kaj elĉambriĝis. Kiel pluveta aero frapis lin. La seĝo staris malsekigata per la akvo falanta el la tegoloj de la ĉambro. "ANIT, ĉu tiu ĉi seĝo estas la nia? Kiu ĝin elĉambrigis? Trankvilanima, ANIT prenis la seĝon, viŝis ĝin kaj en la ĉambron ĝin ŝi metis. Samtempe ŝi malfunkciigis la televidilon kaj li devis denove kuŝi en la kapapo. Tiam ŝi petis de sia edzo, ke li nun iru en la liton: "Ŭoŭo, mi tuj fermos la pordon kaj estingos la lumojn, iru rekte en la liton!" Per raŭka voĉo li respondis : "Ne, ne fermu kaj ne estingu, mi tuj ĉetabliĝos por skribi leteron".*

*Kiel mallaciga kanapo! IFOK tiam tute senkonsciiĝis. Li daŭrigis la dormeton, kiun li ekigis la vesperon. Subite ia ŝtormo da kuloj invadis la ĉambron. Doloretojn li sentis, jen ĉe la piedoj, jen ĉe la brakoj. Li komprenis, ke vekiĝo okazu. Tiam noktomeziĝis kaj IFOK devis kuŝiĝi en la lito*

ŝirmata de kulvualo.

"ANIT, iru ĝis la muro". Tiam ŝi vekiĝis, ellitiĝis kaj, kiel kutime, ŝi elĉambriĝis por viziti la urinejon. Kelkajn minutojn poste, ŝi revenis kaj devis plendi pro doloretoj en la ventro. IFOK neniel ĝeniĝis pro ŝiaj ĝemoj, li kontraŭe ĝojis, ĉar estis efektiviĝanta tio, kion li antaŭdiris al ŝi; "la bebo naskiĝos vendrede kiel mi". Kvankam la ĝemoj pli kaj pli akriĝis, li ĉiam pacienciĝis kaj klopodis konsoli la edzinon, klarigante al ŝi, ke tiun momenton ŝi tia estu.
- Ŭoŭo! ni iru en akuŝejon!
- Ne nun, ĉar vi estas unuenaskanto, do almenaŭ kvar horoj pasu antaŭ ol vi naskos. Paciencigu. La doloro estas normala. Klopodu ne atenti pri tio. Vi scias, ke la akuŝejoj en la urbo estas ĉiam plenaj, kaj la akuŝistinoj devas ĉiam retroirigi hejmen la naskontinojn, kies naskotempo alvenos post kelkaj horoj. Paciencigu, ni tien iros post du horoj.

Kaj ŝi devis observi la dirojn de la edzo kaj iel endormiĝis, ankaŭ la edzo dormis, sed duone, ĉar li devis pririgardi ŝin. Kvazaŭ iu vekus ŝin, ŝi subite vekiĝis kaj diris: "Mi tuj vomos" kaj tio devis okazi. Ŝi tute malplenigis sian stomakon. Tiam, iu timo kaptis la edzon, kiu estis petita de ŝi, ke li faru teon por ŝi.

Jam estis tempo, kiam ili devis iri en la hospitalon. La edzo estis faranta la fajron por la teo. La edzino sidis apud li. Tiam li petis de ŝi, ke ŝi lavu al si la vizaĝon, atendante la pretigon de la teo. Ŝi tion ne faris, sed redonis al la edzo la teleron da akvo, per kiu ŝi devus lavi la vizaĝon.
- Reprenu la teleron!
- Unue lavu la vizaĝon.
- Ŭoŭo, ŝajnas, ke mi blindiĝas, mi nenion vidas plu.
- Ne staru, mi komprenas tion; tio okazu, ĉar vi multe vomis. Baldaŭ vi trinkos la teon kaj ĉio estos en ordo, kaj ni iros tuj al la akuŝejo.
- Prenu la teleron!

Tiu "Prenu la teleron" estis la lasta parolo de la edzino al la edzo, post kiam li devis iri en la akuŝejon, kie ĉio okazis kontraŭe al la deziro de la geedzoj. Tiu nokto, de ĵaŭdo al vendredo, konfuzis la tutan familion kaj devis soligi la edzon IFOK, kiu estas nun senedzina kaj seninfana.



# EKOLOGIO - ĈU IDEOLOGIO ?

(komenco en L! 74)

**3.4. Ekologia etiko**

Ĉar la ekologio estas la plej ampleksa interdisciplina scienco, ĝi kompreneble entenas ankaŭ la sferojn de filozofio, de etiko, de politiko kaj same de la teologio. Sed ne nur pro tiu ĉi formala kialo, sed ankaŭ pro la logiko de siaj propraj problemigoj kaj rezultoj la ekologio signifas ekologian etikon. La problemo de la malpuriĝo de nia biosfero ne estas solvita por la ekologio per tio, ke ĝi ekz. surbaze de analizoj konstatas pro kio la biosfero ne enhavu pli ol certan kvanton da karbondioksido kaj ke ĝi prinomas la procezojn, kiuj kaŭzas troŝarĝon de la biosfero per karbondioksido. Estas samgrava parto de la scienca koncepto de la ekologio demandi <u>pro kio la homo entute aplikas metodojn</u>, kiuj kaŭzas biosferan malpuriĝon. Kaj same estas ĝia konstanta programo ekzameni la religiajn, politik-ideologiajn konceptojn kaj paradigmojn de la homaro koncerne ilian principan konformecon al la bezonoj de la naturo.
<u>Etiko</u> provas doni definitivan respondon per nomado de iu absoluta, kiu mem ne havas iun antaŭkondiĉon. "Ĉi tiun absoluton la etiko komprenas laŭ la principo de moralo kiel liberecon, pli precize kiel liberecon, kiu ne havas bazon ekster si mem, sed fundamentigas sin mem. Kie ajn homa agado pretendas moralecon, estas asertata esti aginta aŭ esti agonta absolute bone. Absolute bona povas esti nomata nur tiu agado, kiu <u>kaj</u> okazas el libereco <u>kaj</u> celas la liberecon (de la aganto aŭ de la per la ago koncerni(o)toj." (Pieper). Aplikante ĉi tiujn frazojn, la ekologia etiko starigas du principajn demandojn:

---

**LITERATURO**

---


23. E. Guhde, Natur und Gesellschaft, Die Blau Eule, 1984 (vd. n-roh 1)
24. Pipers Wörterbuch zur Politik, 1985. 25. A. Schweitzer, Kultur und Ethik, C.H.Beck, 1960. 26. G. Michelsen u.a., Okologie lernen, Fischer alternativ 4100, 1985. 27. C.F. von Weizsäcker, Wege in der Gefahr, dtv sachbuch,1979.
28. H. Skolimowski, Eco-Philosophy, Boyars, 1981. 29. Gaia - Der Oko-Atlas der Erde, Fischer, 1984.
30. N. Albery, How to Save the World, Turnstone Press, 1984.
31. R. Kaiser u.a., Sonnenfänger, Coppenrath, 1984. 32. F. Vester, Ballungsgebiete in der Krise, dtv 10080, 1983.

1. Ĝenerale : Ĉu la libereco de la homo estas akordigebla kun la biologie priskribebla fenomeno de la tutnaturo? Kiel priskribendas la limoj de la homa libereco el ekologia rigardmaniero?
2. Detale : Kiomgrade validas la frazo, ke ago estas bona, nur se ĝi celas la liberecon de pere de ĝi koncernatoj ankaŭ por eksterhomaj vivestaĵoj? - absolute, t.e. per atribuado de propra memo al la naturo (t.e. al ĝiaj nehomaj vivestaĵoj)? aŭ
- relative, t.e. per agnoskado de tio, ke nur la respektado de la libereco de la nehomaj vivestaĵoj de la naturo ebligas la postvivadon (= LA vivon) de la homo?

Jenaj nociokampoj provu priskribi la kadron de ekologia etiko:

3.4.1. Naturo kaj vivo

Centra rilatpunkto de la ekologia etiko estas la fenomeno de la vivo mem, ne iu homkoncepto aŭ ideologio. La homo estas ekkonata (ne pensata aŭ valorigata) kiel parto de la naturo en la senco, ke ŝi/li scias pri tiu parteco kaj volas ĝin kaj ke ŝi/li detruas la naturon nur kun perdo de la propra vivopovo. Vivo ĉiam estas komprenata kiel produkto de ekosistemoj, kies priskribo koncerne strukturon kaj dinamikon de ilia konsisto liveras la unuarangan difinon de vivo. Ĉiu tiu alpaŝo konformas al la pensado de Albert Schweitzer, kiu metas sian naturetikon de la kunkreitaĵeco kontraŭ la modernan antropocentrismon (homcentriĝemon), por kiu en ĉiuj socioj, ĉu kapitalisma aŭ socialisma, la homo estas proprietulo de la naturo. "Mi estas vivo, kiu volas vivi, meze de vivo, kiu volas vivi", li skribis en sia verko "La Etiko de Respekto pri la Vivo" kaj per la konstato "Etiko estas la senlimen pliampleksigata respondeco pri ĉio, kio vivas" li alproksimiĝas al la de Hans Jonas starigita "principo respondeco".

3.4.2. Naturo kaj tekniko

La naturo estas la vivobazo de la homaro. De tiu natura bazo ĝi povas malligiĝi nur je la kosto de memdetruo. La venko pri la naturdetruo postulas fundamentan etikan novkonsciiĝon de

---

**LITERATURO**

33. C. Amery, Ist Kassandra verstummt? Wie sich Politiker und Bürger die Botschft der Warner vom Leibe halten, natur - das umweltmagazin, n-ro 7, 1987.



la homaro en ĝia sinteno kontraŭ la naturo; ekologian etikon, kiu anstataŭas la ekonomisman-teknologian-optimisman hombildon. Ĉi tiu estas karakterizata per la reduktado de la homo je akiro kaj konsumo de materialaj havaĵoj, kiuj estas forprenendaj de la dominata kaj ekspluatata naturo helpe de ĉiam progresanta tekniko.
Hans Jonas prinomas en sia libro "Tekniko, Medicino kaj Etiko. Pri la Praktiko de Respondeco" kvin kialojn, pro kiuj la moderna tekniko devas esti objekto de (ekologia) etiko:

1. Ambivalenco de la efikoj. "Ne nur se la tekniko estas malbonintence, t.e. malboncele, misuzata, sed eĉ, se ĝi estas utiligata bonvoleme por siaj veraj kaj plej legitimaj celoj, ĝi havas minacan trajton, kiu povus porlongtempe esti decidiga... La risko de "tro multe" ĉiam ekzistas."

2. Neevitebleco de la apliko. "Kiam iu aŭ alia nova eblo (de la tekniko) estas prezentita (plej ofte pere de la scienco) kaj evoluigita per realigo malgrandskala, fariĝas ĝia kutimo eldevigi sian utiligon laŭ pli kaj pli granda skalo... Tiel estas malebligata al la tekniko, kiu estas intensigita homa potenco en daŭra agado, ne nur la sfero de la etika neŭtraleco, sed ankaŭ la bonfara dispartigo de posedo kaj praktiko de la potenco."

3. Tutmondaj dimensioj laŭ spaco kaj tempo. "La moderna tekniko plej esence celas grandteknikon kaj en tio eble fariĝas tro granda proporcie al la scenejo, sur kiu ĝi ludas - la Tero - kaj al la bonfarto de la aktoroj mem - la homoj... Per tio, kion ni nun kaj ĉi tie faras, kaj plej ofte nur rigardante nin mem, ni grave influas la vivon de milionoj aliloke kaj estonte, kiuj ne voĉdonis por tio ĉi... etika novaĵo... Kaj la etika kategorio, kiu unuarange estas elvokata per ĉi tiu fakto, nomiĝas "respondeco".

4. Trarompado de la antropocentrismo (homcentriĝemo).
"La sola rajto de la homo pri homa konsideremo kaj morala priatentado estis trarompita ĝuste per ŝia/lia gajno de preskaŭ monopolisma potenco super ĉiu alia vivo. Kiel planedo potenco ŝi/li ne rajtas pensi nur pri si mem... La tekniko, pligrandigante la efikopovon de la homo ĝis punkto, kie ĝi fariĝas senteble danĝera por la tutmastrumado de la aferoj, ĝi plivastigas la respondecon de la homo en la estontecon de la surtera vivo, kiu nun sendepende estas elmetata al la misuzo de ĉi tiu povo."

5. La ekstarigo de la metafizika demando. "Finfine la apokalipsa potencialo starigas la demandon... pro kio entute ekzistu vivo... Se estas kategoria imperativo por la homaro ekzisti, ĉiu memmortiga ludado per tiu ekzisto estas malpermesata..."

La usona profesoro pri ekonomio, Herman Daly, priskribas la modelon de la ekvilibra ekonomio kontraste al la eksponenta ekonomia kresko de la detruaj industrisocioj kiel "konstantajn stokojn de homoj kaj objektoj, kiuj estas tenataj je fiksita kvanto, kiu sufiĉas por homa vivo kaj povas esti konservata dum longa tempodaŭro, kaj ĉe la laŭeble plej malalta produktada kvoto." Li per tio atentigas pri punkto, kiu estas de grava signifo koncerne pritaksadon de ekologiaj-etikaj normoj: ke la civiliza dilemo estas kaŭzita ĉefe per la ekscesoj de ekonomi-teknike "mania" mond- kaj vivo-koncepto, ke "ĉiu etiko estas reduktita je la ŝtupo de individua gusto kaj prioritatoj estas sen interrilataro". Daly resumas: "Fari pli efike ion, kion oni dekomence tute ne faru, estas tre perversa formo de progreso." Ĉi tiu frazo reprezentas efektive ege simplan kaj decidan pritaksokriterion por ĉio t.n. nova, kio ŝajnas taŭgi por feliĉigi la mondon! La mezuro de ĉi tie aludata eksceso ankaŭ povas esti priskribita laŭkvante: La bonstato, kiun ni ĝuas, estas troigata laŭ la kontraŭvaloro de nia ekspluata damaĝo al la naturo!

La ekologia etiko senpere kondukas ankaŭ al aparta kampo de la politika ekologio, kiu konsistas el ĝenerala kaj aktiva kritiko koncerne la regantajn politikajn sistemojn, transe de ĉiuj tradiciaj ideologioj. Ekzempliga en tiu ĉi rilato estas ĵus aperigita eseo de Carl Amery, aŭstria filozofo kaj sociologo, kun la titolo "Ĉu Kasandra mutiĝis? Kiel la politikistoj kaj civitanoj eskapas la mesaĝon de la avertuloj". Li unue karakterizas la "lastan kaj plej triumfan konkretiĝon de la okcidenta civilizo" kiel "senlimigitan konsumismon" kaj "la plej gravan armilon de la Okcidento" kiel "envioplenan komparadon", funkciantan kiel "kaptilo, en kiun ŝajne eniĝas ĉiuj ribeloj kontraŭ la Okcidento kaj ties imperiismo. Post tio li nombras la "mekanismojn, per kiuj la rega regreso, la rega kresko-ideologio, eskapas la mesaĝon" de la profetoj de la ekologia kaj paca movadoj. Tiuj mekanismoj estas ĉefe reprezentataj de tipaj aguloj kaj sintenoj:

1. La murdisto de la mesaĝulo, t.s. forigon, subpremon aŭ fuŝinterpretadon de la mesaĝo.
2. La mokuloj de Kasandra, t.s. transigo de la eksternormeco de la kutimoj en la "alternativa" movado al la esenco de la mesaĝo (fakte intermiksi kondutojn eksterajn kun esencoj internaj).
3. La ŝlosilserĉado sub la konata lanterno, t.s. neado de la fakto, ke la media kaj paca krizoj jam ne plu troviĝas en la sfero de per tradiciaj konceptoj solveblaj problemoj.
4. La senespera kirurgo, t.s. plena ekkono de la situacio kiel serioza, grava kaj nekuracebla, kaŭzante tiel nuran simptomkoncernan terapion.
5. La malsincera magio t.s. "parolaj kaj organizitaj ritoj, kiuj repacigu la ofenditan realon" ekz. aldonaj normoj pri sekureco, kataliziloj, medioministerioj ktp. (Tuj leviĝas la demando: Ĉu eble Esperanto apartenas ĉi tien?)
6. La fenomeno de la pia pekulo, t.s. la ĝenerala interkonsento de subpremado, "en kiu ni ĉiuj partoprenas laŭ la devizo "Iel iu supera potenco helpos nin!" "
7. La fenomeno de prafido, t.s. la malakcepto de la eblo, "ke ni eniĝis en fazon de homa evoluo, en kiu la racio de la historio forlasas la larĝajn domojn de la "normaleco" kaj fariĝis patrino de la barbaj malbonprofetoj, partiano de la minoritato kun perturbita prafido en la ĝusta kuro de la mondaj aferoj..., estiganta timon pri la detrua timo."

Finfine Amery starigas la demandon: "Ĉu la prafido, tiu ĝis nun plej fidinda akompanulo de la homaro, fariĝis ties plej insida malamiko?", malebligante la ekkonadon de la ekologiaj avertoj kiel postulo, eĉ ordono, al aktiva rekonsciiĝo.

## 4. POLITIKA EKOLOGIO - EKOLOGIA POLITIKO

Baza koncepto-postulo de la politika ekologio estas, ke la homo realigu siajn valorojn nur kadre de konsekvence nedifektita biosfero.

En la nocio de politika ekologio kuniĝas enhavoj de la ekologio kiel pure biologia kaj kiel ponta scienco kun tiaj de ekologia etiko kaj filozofio al reale aplikebla programoj kaj konceptoj de ekologiaj partioj, civitanaj iniciativoj, privataj organizaĵoj ktp. Politika ekologio do estas samtempe politika batala nocio kaj analiza programo en la senco de politika fundamenta kritiko, samtempe parenca kaj kontraŭa al la politika ekonomio. Per ĝi artikiĝas la politike engaĝiĝanta movado. Detale:

1. Klopodante rekonstrui la unuon de naturo kaj homo (kulturo), la ekologia movado devas venki la ekonomi-teknikan homkoncepton kaj anstataŭigi la principon de havado per la principo de estado (ekologia humanismo).

2. Necesas politiko, kiu tutmonde registras ĉiujn damaĝojn koncerne naturon kaj medion kaj ties minacon, kaj kiu konceptas longvidajn rimedojn. La neceso de tutmonda ekologia politiko estas la deviga sekvo de la tutmonda karaktero de la mediproblemoj. Preventaj rimedoj pro tio, ĉar nur tiu mediopolitiko estas vere ekologia, kiu superfluigas sin mem.
3. La konservado de la naturo kaj de la vivejo postulas bazon, tra ĉiuj vivosferoj penetrantan rekonsciiĝon, profundan novorientiĝon de la valor- kaj cel-konceptoj.
4. Valoroj kiel laboro je ĉiuj kostoj, materiala pliiĝo kaj kreskanta konsumo, submetigo de la naturo kaj naturekspluatado devas esti anstataŭigata de valoroj kiel: Adekvateco al la naturo, ekologia orientiĝo de la estonteco, respekto pri la vivo, materiala modesteco kaj memlimigo.
5. Ekologiaj ekkonoj devas fariĝi la decida rilatpunkto de la ekonomio- kaj vivo-maniero samkiel de la teknika evoluo.
6. Ekologia politiko baziĝas sur ĉion ampleksanta, tuteca pensmaniero kaj postulas inversigajn ŝanĝojn de la vivo-, laboro- kaj konsumo-praktikoj.
7. Ĉiuj pripensoj, la ekonomiaj, la biologiaj kaj la psikaj, kategorie celas la materialan ŝparemon en la senco de konscia rezisto kontraŭ plivastiĝemo kaj kreskemo de la ekonomio: Ni konsumos malpli. Faros ni ne ĉion, kion ni kapablas fari. Ni el la Tero prenos ne ĉion, kio enestas. Ni rezignos pri la altigo de agrikulturaj produktoj, se tiuj estas atingeblaj nur per ekstermo kaj venenigo de la grundo. Ni estontece ne konsideras nin rajtigataj antaŭenigi grandteknikajn kaj grandekonomiajn evoluojn, se ili signifas ĉe aliaj lokoj en la mondo ekspluaton kaj detruon. Ni foruzos malpli da energio. Ni denove demandos, per kio kaj por kio ni vere vivas, kaj ni cedos al havado kaj posedado pli malgrandan rangon ol ĝis nun.

Ĉefaj komponantoj de aplikata ekologio de la homo, kiel ili estas starigataj kiel ekopolitikaj postuloj de multaj eko-partioj en kreskanta nombro de landoj de la globo, estu resumata laŭ la libro de Eugene P. Odum:

1. Konsekvencaj familio- kaj nasko-kontrolo, tiel, ke la nombro de la posteuloj estas limigata al tiuj, kiuj povas esti amataj, edukataj kaj kreski en la limoj de regionaj ebloj kaj de la disponebla spaco.
2. Regiona planado de la grundo-utiligo kiel rimedo de kontrolado de la grando kaj distribuado de la loĝantaro kaj por certigi, ke en novaj kaj pligrandiĝantaj grandurboj restas libera minimume triono de la grundo.



3. Novorientiĝoj de la impostigo por draste malhelpi stimuladon de la kresko, se la loĝantara denso kaj la premo sur la resursoj altiĝas.
4. Pli intensa priatentado de la medio- kaj konsumanto-protektado en la leĝodonado kaj en la medicinaj kampoj.
5. Interkonsentiĝo pri tio, kio estas optimuma loĝantaro por havi "fikspunkton" por la aplikado de la negativaj retrokupladoj laŭ 1.-4..
6. Prikalkulado de la kostoj sur internacia nivelo por tutaj cikloj, t.e. kostoj por produktado, malpurigado kaj reciklado. Ĉi tiuj kostoj estu konsiderataj kune kaj ne unuope. La konsiderado de tiaj cikloj de la tutaj produktoj devas esti aplikataj ankaŭ je agrikulturaj sistemoj.
7. La evoluigo de spacveturila ekonomio, kiu atribuas grandan signifon al la kvalito de la nominala kapitalo kaj en al la produktadkvotoj kaj al konsumo, evoluigo de konscio pri kvalito kaj ne pri kvanto.
8. Reciklado kaj severaj ŝparorimedoj ĉe akvo kaj mineraloj kaj biologiaj krudmaterialoj.
9. Ĉe ruboforigo oni priatentu la kromproduktojn, inkluzive de la priekonomiado de defalaĵoj per triaj purigofazoj kaj reduktado de defalaj substancoj cele produktadon de ripozumaj regionoj, akvo-kolektaj regionoj kaj sana aerospaco.
10. Ĝenerala ekkono, ke la urbo dependas de sia verda pejzaĝo en ĉiuj siaj vivonecesaj resursoj (aero, akvo, nutraĵo) kaj ke la kamparo dependas de la urbo koncerne la ekonomiajn aferojn. La nuntempa memmortiga politika konfrontado inter urba kaj rura loĝantaroj devas esti anstataŭigata per laŭeble plej kompleta akordo pri tio, ke la urb-rura komplekso estas unu sistemo.
11. Longvidaj solvoj de gravaj problemoj devas esti unuarangaj.
12. Pli multe atendadas en la edukado de baza lernejo ĝis instruado de teknikistoj la principo de totaleco de homo kaj medio kiel unuo, t.e. la ekosistem-ekologio.

## 5. EKOLOGIO - ĈU IDEOLOGIO ?

La respondo al la demando en la titolo de ĉi tiu kompilaĵo praktike rezultas aŭtomate el la prezentita. Resume direndas:

1. Ekologio estas scienco, kiu tempe-space priskribas objektivan realon kaj devenigas el tio difinitajn postulojn. Ideologioj estas valorsistemoj, kiuj priskribas subjektivajn postulojn, kiuj efektiviĝendas en tempo kaj spaco.

2. Ekologio kiel scienco estas ŝanĝebla laŭ la stato de la sciencaj ekkonoj, kiuj estas objektive kaj principe kompreneblaj al ĉiuj homoj. Ideologioj kutime estas laŭprograme fiksitaj konceptoj, ideoj, valoroj, al kiuj oni subjektive sin dediĉas.
3. Ekologio kiel pontoscienco havas apartaĵon, ĉar ĝi ampleksas ĉiujn natur- kaj soci-sciencojn. Tio estas kaŭzata pro la fakto, ke la esplorobjekto de la ekologio estas la vivo kaj ĝiaj medioj. Sed vivo estas natur- kaj soci-scienca fenomeno. Celo de la ideologioj estas la konservado de la vivo. Ekologio volas la vivon, de kiu la homo estas nur parto. Ideologioj ne esploras, ili estas rezultoj de valorigoj. Celo de la ideologioj estas la homo, unuopkaze la konservado de aparta koncepto pri la vivo de la homo. Ideologioj volas sin mem.
4. Ideologioj ekologion povas nur ignori, sed ne kritiki. Inverse, por la ekologio estas ekzamenendaj la ideologiaj enhavoj koncerne iliajn funkciojn por la vivo. La valorkonceptoj de la socioj estas analizataj de la ekologio koncerne tion, ĉu kaj laŭ kiu mezuro ili povas esti tolerataj de la naturo. La ekologio enmetas la postulojn de la homaro en ĝeneralan liston de prioritatoj por la naturo kaj ne inverse kiel en la plejmulto de la ideologioj.
5. Ĉe ampleksigo de la ekologia baza nocio en ekologian etikon konstateblas, ke la ekologio etiko fiksas absolutajn decidojn, kiuj draste relativigas la signifon kaj efikecon de ideologiaj enhavoj. Ekologoj efektive devas sin demandi: "Ĉu la vivo valoras ideologiojn?" Ĉiukaze decidoj, kiuj unuarangas ĉe ideologioj, ludas nur malgravan rolon por la ekologia etiko. Tiel la nocio de libereco por la ekologio havas nur malpli fortan signifon kompare al multaj ideologioj. Tio estas kaŭzata per la libervola rezigno de la ekologia pensado kaj agado pri la utiligo de certaj vivoendanĝerigaj "liberecaj trajtoj" de la homo. Per tio restas malpli da batalo-potencialo en la nocio de libereco. La libereco de la homo en la ĝenerala senco komenciĝas por la ekologo nur post kiam ĝi jam estas ekologie limigita. Nur pro tio la kuraĝo de la ekologoj al plenlibera kritiko koncerne ĉiujn fenomenojn de ĉiuj socioj!

Ni do alvenas al la rezulto, ke ĉe ekologio ne povas temi pri ideologio en la klasika senco. Restas la demando, ĉu ekologia pensado kaj agado estas realigebla kadre de ĉiu ideologio. Certe nur kun restriktoj kaj peno kaj ne en la plej antaŭa frontlinio. Sed: Ekologio estas lernebla! Principe pli facile ol multaj ideologioj, por kiuj oni bezonas valorigan juĝon kaj al kiuj oni ankaŭ devas esti edukataj. Sed eble savo de la Planedo



kies pereo jam de kelke da tempo mezureble marŝas, eblas nur tra konsekvenca ekologiigo de la ideologioj. Ĉi tie denove temas pri potenco. Ĉar la ideologioj havas potencon kaj aspiras potencon en la senco de regado, dum tiu ĉi por la ekologio ne estas memstara grava nocio kaj enhavo. La ekologia homo kontentiĝas, kiel dirite, pri memrealiĝo sen difektado de la naturo.

**Wolfgang Gunther**

---

VALO



VORTOJ
DE
MALJUNULO

## Pri efikoj de moderna tekniko

*Antaŭ 20 jaroj mi perdis, neripareble, la vidkapablon de unu okulo. Poste la alia difektiĝis pro katarakto, kaj en la lastaj monatoj la difekto pligraviĝis en akcela gradado. Mi decidis pri operacio.*

*Helpe de lasero kirurgo lerte elprenis el la malsana okulo la opakiĝintan kristalinon, kaj anstataŭe enmetis novan artefaritan. La rezulto superas ĉian esperon. Nun mi denove legas sen lupeo, skribas facile, bone distingas kolorkontrastojn kaj nuancojn.*

*En la sama periodo grade difektiĝis ankaŭ mia aŭdkapablo. Elektra protezo, preskaŭ nevidebla, nete plibonigis ĝin.*

*Mia vivo estas tre kontentige ŝanĝita per tiuj du artefaritaj aranĝoj.*

*Artefarita! Kiom ofte mi aŭdis tiun adjektivon prononcata en malŝata tono el la buŝo de kontraŭuloj de esperanto!*

*Kvazaŭ ili, kiel iliaj malproksimaj praavoj, kaŭradus en naturaj kavernoj, kaj ne loĝus, kiel vi kaj mi, en artefaritaj domoj.*

*Kvazaŭ ili ne kutimus ŝirmi sian delikatan haŭton per vestoj el artefaritaj teksaĵoj.*

Kvazaŭ ili neniam uzus artefaritajn transport- kaj komunikrimedojn.

Kvazaŭ ili ne aŭskultus artan muzikon el artefaritaj instrumentoj*, kaj ne ludus per artefaritaj ludiloj.

Kvazaŭ ili ne nutrus sin per arte kuiritaj manĝaĵoj. Kvazaŭ nia pano, nia vino, nia biero ne estus produktoj de tre ellaborita arto.

Kaj ĉu nia nuna tritiko, niaj vinberoj, niaj ĝardenfruktoj estas spontanaj kreaĵoj de la naturo? Ĉu ili ne rezultas de jarmila transformado per kulturarto?

Ĉion ĉi oni nomas civilizacio kaj progreso. Sendube, ne ĉiuj "progresoj" estas bonaj. Multaj estas almenaŭ senutilaj, eĉ malutilaj, eĉ danĝeraj. Necesas kribri, forĵeti la malbonajn kaj elekti la bonajn.

Mi estas naturisto kaj ekologiano, sed mi vivas en mia epoko, ne en la komenco de la kvaternara erao; kaj mi konfesas, ke multaj akiroj de la progreso ŝajnas al mi bonaj kaj ĝuindaj.

Kaj, pretekste de "artefariteco", ni rifuzus tiun senduban, nekontesteblan progreson: lingvon internacian, kiu interproksimigas la homojn, kaj faras el ili ĉiuj fratojn!

Dankon al la okulkirurgo kaj al la orelprotezisto, kiuj redonis al mi bonan vid- kaj aŭdkapablon.

Dankon al ilia kolego, la bona Doktoro Zamenhof. Ankaŭ li sindoneme kuracadis okulmalsanulojn. Plie, li vidigis al la homoj, ke nia Tero estas unu granda lando, kaj la homaro unu granda familio. Kaj li redonis aŭdon al la popoloj, komparitaj kun "surduloj, el kiuj ĉiu estas murenfermita en sia lingvo kiel en malliberejo". (Romain Rolland)

------

* Oni relegu, en "Vortoj de Profesoro Cart", la legendon pri la deveno de arta muziko.

## Wall-Street 1929-1987

**Mi** ne estas kompetenta pri financo, nek persone interesata pri la fluktuadoj de la akciaj kurzoj, ĉar mi ne estas borsludisto. Tamen, kelkajn vortojn pri tiuj aferoj.

La 18an de oktobro en la Nov-Jorka borso, kiu donas la tonon al ĉiuj aliaj, la kurzoj subite disfalis. Tiu okazo venis neatendite post plurjara periodo da konstanta kreskado, evidente artefarita: ĝi ne povis longe pludaŭri. Tion ja komprenis kelkaj spertuloj, sed neniu antaŭvidis tiel abruptan falon,



ŝajne kaŭzitan de subita ĉesigo de la universala fido al la usona prospero.

Tamen, ĝis antaŭ nelonge, financistoj kaj ekonomiistoj fanfaronis, ke ili nun posedas efikajn teknikajn rimedojn por eviti kaj eĉ malebligi tiajn skuegojn. Al tiuj eminentaj sinjoroj ne mankas memfido kaj aplombo.

Ili, eble prave, riproĉas la marksistojn, ke ili rezonas laŭ kadukaj kriterioj de la 19a jarcento. Nu, ĉu ili mem ne malfruas je unu jarcento, aŭ almenaŭ duonjarcento?

Fakuloj kaj gazetistoj tuj elvokis la kraŝon de 1929, kiun sekvis la longedaŭra kaj profunda krizo de la tridekaj jaroj en tuta Okcidento. Laŭ supraĵa aspekto la aferoj estas ja similaj, sed inter ambaŭ okazoj mi vidas esencan diferencon.

Post 1929 sekvis ekonomia marasmo kaj senlaboreco. Nun tiu sama plago jam ekzistas. Ĝi instaliĝis longe antaŭe, sendepende de la financaj okazoj. Dum la lastaj jardekoj sin sekvis pluraj teknikaj revolucioj (elektra, robota, elektronika, informatika), kiuj radikale ŝanĝis la produktorimedojn kaj la tutan industrian kondiĉaron. Tiujn ŝanĝegojn ne vidis aŭ ne volis vidi la ortodoksaj kompetentuloj. Ili ne volas konsenti, ke la novaj cirkonstancoj nepre postulas novan rigardon al la aferoj. Ne temas plu pri "ciklaj" krizoj, sed pri kronika malsano ĉefe kaŭzita de la ega produktiveco de la modernaj maŝinoj, kiuj jam anstataŭas la homan forton. Por kuraci tiun malsanon, necesas unue dividi la labortempon ne plu inter du aŭ tri skipoj da laboristoj, sed inter kvar, inter ses. Kaj ke ĉiu laboristo ricevu sufiĉe aĉetpovan salajron, por konsumi la tutan kvanton de la produkto de la maŝinoj. Sed kie trovi la necesan monon? Nu, kion faras la ŝtatoj en milita tempo, kaj kion faras nun Usono? Ili simple presigas kvanton da monbiletoj kun konvencia valoro. Nur necesus, ke tiu valoro estu konvencie efemera, por ne ebligi artefaritan amasigadon de iluziaj riĉaĵoj. Anstataŭ tiu artefarita riĉaĵo, la mono estus nur adaptita signo interŝanĝebla kun la disponebla kvanto da produktitaj varoj.

Mi nur grandtrajte skizis la teorion de la abundanoj ellaboritan antaŭ duonjarcento de J. Duboin, Bellamy ks. Ĝia efektivigo estus ebla, sub la nepra kondiĉo de tutmonda sennacieca organizo: ĉar tiel longe, kiel ekzistos suverenaj naciaj ŝtatoj kun apartaj buĝetoj, apartaj ekonomiaj, apartaj monsistemoj, okazos inter tiuj naciaj ŝtatoj drasta, sovaĝa konkurenco; kaj se unu el ili volus starigi interne de siaj limoj tiun novan ekonomian sistemon, ĝi baldaŭ ne povus rezisti al tiu konkurenco.

*De tiu nun reganta stato rezultas "riĉaj" nacioj kun kelkaj grandaj riĉuloj kaj amaso da malriĉaj senlaboruloj, kaj malriĉaj nacioj, en kiuj, krom eble kelkaj lukse vivantaj ŝtatestroj, la tuta popolo vivas en mizero aŭ mortas pro malsato.*

*Ĉu iam la homaro estos sufiĉe mense evoluinta por scipovi eliri el tiu vea kaosa stato?*

## Surtera paradizo

*Oni iafoje proponas al ni Japanion kiel modelon de surtera paradizo, kie ĉiu ĝoje laboras kaj agrable vivas. Mi tre dezirus legi pri tio senperajn informojn de niaj japanaj kamaradoj pri la vera situacio en ilia lando. Ĉu tie vere paradiza estas la ĉiutaga vivo? Mi legis en gazeto, ke nun en Japanio ekmanifestiĝas signoj de komenco de senlaboreco. Se tiel estas, se la moderna plago trafas ankaŭ la benitajn insulojn de Sunleviĝo,...*

*Nia okcidenta mondo, inkluzive de for-orienta Japanio, fieras pri la grandiozaj atingoj de sia teknologia evoluo. Ĝi ja pliigas la komforton por multaj tavoloj de la socio. Ĉu ankaŭ la feliĉon?*

*Mi diras, ke tiel longe, kiel ni vidos almozulojn kaŭrantaj sur trotuaroj kaj etendita mano; tiel longe, kiel staros longaj atendvicoj ĉe popolsupoj aŭ "restoracioj de l'koro", kaj en tiuj vicoj kelkaj dece vestitaj personoj - videble novaj malriĉuloj viktimoj de senlaboreco; tiel longe, kiel ekzistos senrimedaj senlaboruloj; tiel longe, unuvorte, kiel estos videbla aŭ kaŝa mizero apud kelkaj miloj da privilegiuloj, kiuj lukse vivas, kaj por frivolaĵoj elspezas (do ankaŭ enspezas) grandegajn monsumojn; tiel longe ankaŭ, kiel niaj relative bonstataj socioj en evoluintaj landoj fuŝuzados nutraĵojn kaj ĉiajn utilaĵojn dum aliaj popoloj suferas kaj mortas pro malsato; tiel longe, kiel staros palacoj apud domaĉoj kaj kabanaĉoj, tiel longe, kiel estos dediĉitaj gigantaj monsumoj al armado, dum mankas ie nutraĵoj, kuracaĵoj kaj ĉiaj necesaĵoj, dum en hospitaloj mankas flegistoj, en lernejoj klasĉambroj kaj instruistoj, en laboratorioj instrumentoj kaj serĉistoj; tiel longe, kiel ekzistos tiuj laŭtege kriantaj malekvilibroj, tiuj evidentaj problemoj, kiujn niaj registoj, tamen inteligentaj kaj kompetentaj, ne scipovas (aŭ ne volas?) pritrakti kaj solvi - tiel longe ne estos paradizo sur nia planedo.**

-------

* Antaŭ ol ĝi ekekzistos, mi kaj miaj samaĝuloj estos jam longe mortintaj. Ĉu eĉ niaj pranepoj vidos ĝin?



# BIOLOGIO DE L' KONDUTADO

aŭ

## "Kiel malkodi la homan mesaĝon"

Teksto verkita helpe de libroj de Henriko LABORIT pri la biologio de la kondutadoj.

Henriko LABORIT, eks-kirurgo de la maristaro, nuntempe estras la entomologian laboratorion en la hospitalo Boucicaut en Parizo. Li ellaboris la unuan trankviligilon (**Klorpromazin**) kaj metodon por artefarita fridodormado.
Sed precipe, de pli ol 30 jaroj, li esploras la mekanismojn de la vivantaro ekde la molekulo ĝis la homaj kondutadoj.
La granda publiko malkovris liajn laborojn dank'al la filmo de Alain RESNAIS "**Mia onklo el Ameriko**", kiu havis pli ol du milionojn da spektantoj, kaj tra deko da libroj kun granda diskonigo, kiuj reliefigas la mekanismojn kondukantajn al la "inhibicio de la ago", al la psikosomataj malsanoj, al la strukturoj de superrego.

-------

La nura celo de estulo estas esti, t.e. plu teni sian strukturon, plu vivi; sen tio estulo ne estus.
Eblas rimarki, ke la plantoj povas plu vivi sen moviĝi, ili ĉerpas sian nutraĵon rekte el la grundo, tie, kie ili troviĝas kaj dank'al la suna energio ili transformas tiun senvivan materion de la grundo (fosfato, kalio, ktp) en sian propran vivan materion.
La animaloj, do ankaŭ la homo, kiu estas animalo, povas plu vivteni sin, nur se ili konsumas tiun sunan energion, jam trans-

formitan de la plantoj, kaj tio trudas moviĝon. La bestoj kaj la homo estas do devigataj agi interne de spaco, kaj por moviĝi necesas nerva sistemo.
Tiu nerva sistemo agas, ebligas agi sur la medion kaj en la medio; kaj ĉiam por la sama celo: certigi sian pluvivon. Tiel, impulso instigas la vivantaĵojn plu teni sian biologian ekvilibron, sian vivantan strukturon, plu teni sin vivaj, kaj tiu "impulso" esprimiĝas en kvar bazaj kondutadoj:

**1-a konduto:** konduto de konsumado (trinki, manĝi, kopulacii)
**2-a konduto:** konduto de fuĝado (okaze de danĝero, fuĝo estas ofte plej efika)
**3-konduto:** konduto de luktado (por detrui la fonton de la danĝero)
**4-a konduto:** konduto de inhibicio (kiam eblas nek fuĝi nek lukti)

Cerbo utilas ne por pensi, sed por agi. La evoluado de la specioj estas tre konservema kaj en la cerbo de la bestoj troviĝas tre primitivaj formoj.
Oni distingas tri partojn:

**1-a cerbo.** La reptilia cerbo. Mak Lin (Mac Lean) nomis ĝin reptilia cerbo. Efektive ĝi estas tiu de l' reptilioj. Ĝi komandas la kondutojn de tuja pluvivo, sen kio la besto ne povus plu vivi. Tiuj kondutoj estas:
a) trinki, manĝi, kio ebligas plu teni la biologian strukturon
b) kopulacii, kio ebligas reproduktiĝon.

Tuj kiam oni konsideras la mamulojn, dua cerbo aldoniĝas, kiun Mak Lin nomis emocieca cerbo, kaj kiun Laborit preferas nomi memora cerbo.

**2-a cerbo.** La memora cerbo. Sen memoro de tio agrabla, malagrabla, ne eblas esti feliĉa, malĝoja, angorplena, amsopira, kolera. Malfacile estas deziri aferon, kies ekziston oni ne scias.

**3-a cerbo.** La asocia kortekso.

Tiu tria cerbo, kiu aldoniĝas al la du unuaj, estas nomata ankaŭ cerba kortekso, kaj ĉe la homo ĝi konsiderinde disvolviĝis dank'al la stara pozicio. Oni ĝin nomas asocia kortekso tial, ke ĝi asocias la subkuŝantajn nervajn vojojn, kiuj konservas la spuron de la pasintaj spertoj. Ĝi ilin asocias diference de tiuj, kiuj estis impresataj de la medio en la momento mem de la sperto. Tio signifas, ke ĝi kapablas krei, realigi



imagan procezon.
Tiel, en donita situacio, oni nekonscie aprecos la plej efikan manieron agi, laŭ niaj pasintaj spertoj, laŭ tio kion oni lernis pri la pli-malpli ĝusta efikeco de tia tipo de agado aŭ de konduto en tia tipo de situacio. Oni do nekonscie anticipas la rezulton de la venonta agado. Oni sentime agas, se oni estas aŭ nur supozas esti rekompencita, kaj oni angoras, se oni timas fiaski aŭ esti punata.
Nu, en la homa cerbo tiuj tri supermetitaj cerboj plu ekzistas, niaj impulsoj plu estas tiuj tre primitivaj de la reptilia cerbo. La tri etaĝoj de la supermetitaj cerboj devas funkcii kune, kaj por tio ili estas kunligitaj per faskoj, kiuj estas klasifikeblaj jene:
1. La fasko de la rekompenco
2. La fasko de la puno
3. La fasko de la ago-inhibicio.

Por ekzemplo, la kareso de patrino al sia infano, la ordeno, kiu flatas la narcicismon de militisto, la aplaŭdoj, kiuj akompanas la deklamaĵojn de aktoro, ĉio ĉi liberigas kemiajn substancojn, kies rekompenco-fasko kondukas al la celata plezuro.
Sed oni devas scii, ke en la komenco de la ekzisto la cerbo ankoraŭ estas nematura, kio signifas, ke la sperto, kiun la animalo aŭ homo ricevas de la ĉirkaŭaĵo dum la du aŭ tri unuaj jaroj, estas neforviŝebla. Tion oni nomas la stampofenomeno. Konrad LORENTZ konstatis, ke junaj birdoj ne rekonas siajn samspecianojn, kiam ili kreskis aparte antaŭ ol ilin renkonti.
Oni same povas citi la kazon de kato kreskinta en kaĝo kun horizontalaj stangetoj; se, post pli ol du monatoj (kio respondas al la periodo dum kiu ĝia cerbo estas plej modlebla, du jaroj ĉe la homo), oni ĝin metas en kaĝon kun vertikalaj stangetoj, dum sia tuta vivo, ĝi neniam plu vidos ilin.
Jen fine la ekzemplo de juna koko, kiu kreskis izolite tuj de la naskiĝo for de siaj samspecianoj, sed sub kies disponon oni metis tromplogilon: gipsan kokinon. Je la vekiĝo de sia seksececo, ĝi provos kopulacii kun la gipsa kokino. Poste metite en ĉeesto de vera kokino, li daŭrigos la aferon kun sia tromplogilo, ignorante la veran kokinon, tial ĉar ĝia sperto kun la tromplogilo ebligis al ĝi kontentigi siajn bezonojn; ĝia agado estis efika; de tiu rezultis per ĝi impreso de plezuro, kiun li provas reprodukti.
Do la sperto, kiun la homo akiras per sia ĉirkaŭaĵo dum la unuaj jaroj de sia vivo, estos neforviŝebla kaj konsistigos ion

konsiderindan por la evoluo de lia kondutado dum lia tuta ekzisto. Finfine ni devas ekkonscii, ke la stimuliloj, kiuj penetras en nian nervan sistemon jam de la naskiĝo kaj eĉ antaŭe, en utero, venas al ni esence de la aliaj. Ni estas nur la aliaj. Kiam ni mortos, la aliaj, kiujn ni internigis en nian nervan sistemon, kiuj konstruis nian nervan sistemon, mortos ankaŭ.

Do niaj tri cerboj kuŝas tie; la du unuaj nekonscie funkcias; ni ne scias, kion ili igas nin fari: impulsojn, kulturajn aŭtomatismojn, ktp... kaj la tria (la asocia kortekso) donas al ni klarigan lingvaĵon, kiu ĉiam liveras ekskuzon, alibion pri la agoj ŝuldataj al la nekonscia funkciado de la du unuaj. Oni do povas distingi kvar tipojn de kondutado:

1. konsuma kondutado. Por satigi la fundamentajn bezonojn.
2. plezurdona kondutado. Oni celas reigi agon, ĉar oni prosperte scias, ke ĝi kondukas al plezuro.
3. kondutado, kiu respondas al la puno.
a) Jen per la fuĝo, kiu evitas la punon.
b) Jen per la lukto, kiu provas detrui la agresanton.
Se la lukto efikas, oni atingas la plezuron, la gratifikon.
Se la lukto ne efikas, jen la puno.
4. inhibicia kondutado. Oni ne plu moviĝas, oni streĉe atendas, kaj ĉe la homo oni atingas angoron; angoro estas la neeblo superregi situacion por efike agi.

Por ilustri tiujn kvar tipojn de konduto, jen priskribo de tri eksperimentoj faritaj per ratoj:

1-a eksperimento.
Oni metas raton en dufakan kaĝon, t.e. kies spaco estas duonigita per septo, en kiu troviĝas pordo kaj kies planko estas intermite elektrizita. Antaŭ ol la kurento pasos tra la planka dratreto, sonora signalo avertas la beston, kiu troviĝas en la kaĝo, ke nur kvar sekundojn poste la kurento pasos. Sed tion ĝi ne scias ĉe la komenco. Ĝi rapide tion rimarkas. En la komenco ĝi estas tre maltrankvila, kaj tre rapide ĝi rimarkas, ke estas malfermita pordo kaj pasas en la apudan fakon, kie la planko ne estas elektrizita. Sed la samo reproduktiĝas post kelkaj sekundoj. La besto ankaŭ tre rapide lernos, ke ĝi povas eviti la punon de la elektra ŝoketo, kiun ĝi ricevas en la kruretoj pasante en la fakon, kie ĝi estis en la komenco; tio ĉi okazas tuj kiam sonoras la signalo (kio estas la kondiĉigo*).

----

*) La eksperimento de Pavlov estis diferenca en tio, ke la celo estis evidentigi jenon: hundo, al kiu oni kutimas prezenti nutraĵon samtempe eklumigante lampon, fine salivas tuj kiam oni nur eklumigas la lampon.



Tiu besto, kiu suferas tiun eksperimenton dek minutojn ĉiutage dum sep sinsekvaj tagoj, estos ĉe la fino de la sep tagoj en perfekta sano, en perfekta stato: ĝia hararo estas glata, ĝi ne suferas arterian hipertension, per fuĝo ĝi evitas la punon, ĝi sin plezurigis, ĝi plu tenis sian biologian ekvilibron.

2-a eksperimento.
En la dua kazo la pordo estas fermita; la rato ne povas fuĝi kaj do estas submetata al la puno, kiun ĝi ne povas eskapi. Tiu puno estigas en ĝi inhibician konduton. Ĝi ekscias, ke ĉia ajn ago estas neefika, ke ĝi povas nek fuĝi, nek lukti: ĝi inhibiciiĝas; kaj tiu inhibicio, tuj akompanata ĉe la homo de tio nomata angoro, estigas en la rata organismo biologiajn perturbojn konsiderindajn. Tiel ke, se mikrobo preterpasas aŭ se la rato portas mikrobon sur si, dum normale la rato povus malaperigi ĝin, ne povante fuĝi la punon, ĝi disvolvos infektaĵon. Se ĝi havas kanceran ĉelon, kiun ĝi estus povinta detrui, ĝi evoluigos kanceron*. Kaj ĉiuj tiuj biologiaj perturboj kondukas al ĉio nomata malsanoj civilizaj aŭ psiko-somataj (de la greka: **psyché** = animo/ **sôma** = korpo) tiaj, kiaj stomakaj kanceroj, arteria hipertensio, sendormeco, laciĝo aŭ malbonstato.

3-a eksperimento
En tiu tria situacio la rato ne povas fuĝi, ĝi do ricevas ĉiujn punojn, sed ĝi estas fronte al alia rato, kiu servas al ĝi kiel kontraŭulo; en tiu kazo ĝi luktas. Tiu lukto estas plene neefika, ĝi ne ebligas al ĝi eviti la punon de la elektra ŝoko sed ĝi agas... Nerva sistemo servas nur por agi. Tiu rato suferos neniun patologian akcidenton, ĝi disvolvos neniun malsanon, kontraŭe al la antaŭa kazo. Ĝi estos perfekte sana, kvankam suferinte ĉiujn punojn.

Sed kio estas facila por rato en kaĝo estas multe pli malfacila por homo en socio. Precipe, iuj bezonoj estis kreitaj de tiu ensocia vivo jam de la infanaĝo, kaj la homo malofte povas sin helpi per lukto, kiam la fuĝo ne estis efika. La sociaj leĝoj ĝenerale malpermesas tian defendan perforton. La laboristo, kiu ĉiutage vidas sian laborestron, kies vizaĝo ne plaĉas al li, ne povas rompi lian kapon, oni sendus al li la ĝendarmojn; li ne povas fuĝi, li estus senlabora. Kaj ĉiujn tagojn, ĉiujn semajnojn, ĉiujn monatojn, ĉiujn jarojn, kiuj sinsekvas, li estas en inhibicio de la ago.

----

*) Eksperimentoj montris ankaŭ, ke kunikloj, kreskinte en ĉirkaŭaĵo plej favora (bone nutrataj, karesataj, ktp...) ĉe kiuj oni enplantis kanceran tumoron, estas kapablaj detrui tiun kanceran tumoron. Dum aliaj kunikloj, bredataj en kaĝo grandproporcie disvolvas kanceron.

La homo povas plurmaniere lukti kontraŭ tiu ago-inhibicio. Li povas uzi la agreson; la agreso neniam estas senmotiva, ĝi ĉiam estas respondo al ago-inhibicio. Ĝi kondukas al eksplodo, kiu estas malofte profitdona, sed kiu, rilate la funkciadon de la nerva sistemo, estas perfekte klarigebla.
Tiu situacio, en kiu la individuo povas troviĝi inhibiciita en sia agado, regas la tutan patologion. La biologiaj perturboj, kiuj ĝin akompanas, malbridos same la aperon de infektaj malsanoj, kiel ĉiujn kondutojn de tio nomata la mensaj malsanoj.
Kiam la agresemo de la individuo ne plu povas esprimiĝi kontraŭ la aliaj, ĝi ankoraŭ povas esprimiĝi kontraŭ li mem. Ĉiel, li somatigos, nome li direktos sian agreson al sia stomako, kie li faros truon: stomakan ulceron; al sia koro kaj angioj: li suferos arterian hipertension, aŭ iafoje akutajn lezojn, kiuj kondukos al subitaj kormalsanoj: infarktoj, aŭ al cerbaj hemoragioj, urtikarioj, astmaj krizoj.
Li povos ankaŭ orienti sian agreson kontraŭ si ankoraŭ pli efike: li povos sin mortigi mem.
Kiam oni ne povas esti agresema kontraŭ la aliaj, oni povas tiel esti kontraŭ si.
Kiam oni estas en tia situacio, kiam du individuoj havas diferencajn projektojn aŭ eĉ la saman projekton, kaj kiam ili ekkonkuras por la realigo de tiu projekto, estiĝas gajnanto kaj perdanto. Establiĝas superrego de unu el la individuoj super la alia. La serĉado de la superrego, en spaco kiun oni povas nomi teritorio, estas ĉe la bazo de ĉiuj homaj kondutoj, kaj tio en plena nekonscio pri la realaj motivoj.
Do ne estas proprieta instinkto, do, ankaŭ ne estas superrega instinkto. Estas nur lernado, per la nerva sistemo de individuo, pri la neceso por tiu ĉi konservi sub sia dispono objekton aŭ estulon, kiu estas dezirata, enviata ankaŭ de alia estulo; kaj li scias per lernado, ke en tia konkurado, se li volas konservi tiun objekton aŭ tiun estulon, li devas superregi.
Tiel, la infano, kiu naskiĝas, memoras nenion aŭ preskaŭ nenion en la patrina ventro. Tie ĝi havis ĉion bezonatan (ĝi estis nutrata, loĝata, purigata), ĝi havis eĉ ne bezonon spiri. Ĝi estis en stato, en kiu ĝi ne havis la konscion esti, nocioj de tempo kaj spaco estis for. Ĝi do ne konis tion, kio estas manko, seneco, sufero. Kiam ĝi naskiĝas, ĝi restas dum la unuaj monatoj de sia ekzisto en tiu stato de neniom aŭ de malmulte da konscio tial, ke ĝia cerbo ankoraŭ nenion aŭ preskaŭ nenion enmemorigis.
Tiun staton, en kiu ĝi troviĝas en la unuaj monatoj de sia vivo, oni nomas la "mio-ĉio", ĉar la novnaskito ne diferencigas



inter si kaj la aliaj, inter si kaj la ekstera mondo. Tiel, ĝi ofte kolizias, kaj ankaŭ tial endas tranĉi al ĝi la ungojn, ĉar ĝi estas kapabla gratvundi sin: ĝi ankoraŭ ne scias, ke ĝi tuŝas parton de si mem, ĝi ankoraŭ ne konas tion, kion oni nomas ĝia korpa skemo.
Iompostiome, ĝi enmemorigas la informojn, kiuj venas al ĝi de la ekstera mondo per la sensaj vojoj, kiuj estas la tuŝosento, la vidkapablo, la aŭdo, la flarsento. Tiuj informoj plenigas la duan cerbon, pri kiu antaŭ momento ni parolis (la memora cerbo). La tria cerbo (la asocia kortekso) povas ankoraŭ nenion asocii, ĉar la novnaskito ankoraŭ nenion aŭ preskaŭ nenion enmemorigis. La unua cerbo (la reptilia cerbo) plenumas sian rolon, tuj kiam Bebo malsatas; kriante, ĝi tion komprenigas al sia patrino, kiu ebligas al ĝi plensatigi sian manĝo-bezonon, kio kondukas ĝin al sensacio plezuriga kaj tiel de ĝi registrita.
Kiam, ĉirkaŭ la 8a aŭ 10a monato, ĝia iompostioma agado super la medio igas ĝin ekkonscii pri sia ekzisto malkuna de la ĉirkaŭaĵo, ĝi malkovras sian patrinon, ĝistiaman fonton de ĉiuj rekompencoj. Sed kiam ĝi malkovras ankaŭ, ke tiu plezurdona estulo apartenas ne nur al ĝi sola, sed ankaŭ al la patro, al la gepatroj, ĝi subite komprenas, ke ĝi povas parte perdi sian gratifikon kaj malkovras la edip-komplekson, la ĵaluzon kaj la malfeliĉan amon. De tiam ĝi volas alpropr igi al si sian patrinon, kaj same ĉiujn estulojn aŭ objektojn, kiuj estas por ĝi fonto de plezuro, de "gratifiko".

La lingvaĵo tiel kontribuas nur por kaŝi la kaŭzojn de la superregoj, la mekanismojn de la starigo de tiuj superregoj, kaj por igi la individuon kredi ke, laborante por la socia ensemblo, li realigos sian propran plezuron; dum li ĝenerale nur plu tenas hierarkiajn situaciojn, kaŝitajn sub lingvaj alibioj, kiuj servas al li kiel ekskuzoj.
La nekonscio konsistigas timindan instrumenton, ne pro sia repuŝita enhavo (repuŝita, ĉar ties esprimo estus tro doloriga por la individuo, kiu estus punata de la socio, de la soci-kulturo), sed pro ĉio, kio estas, male, permesata kaj rekompencata de tiu soci-kulturo, kaj kiu estis lokita en lia cerbo jam de lia naskiĝo; li ne konscias, ke ĝi estas tie, kaj tamen liajn agojn ja gvidas ĝi.
Tiu ĉi nekonscio, kiu ne estas la freŭda nekonscio, estas la plej danĝera. Fakte, kion oni nomas la personeco de individuo (**personna** = masko /etruska vorto. individuo = nedividebla) estas konstruita sur brokantaĵo el valorjuĝoj, el banalaj ĝeneralaĵoj, el antaŭjuĝoj, kiujn li kuntrenas, kaj kiuj estas malpli

kaj malpli repridiskutataj, pli kaj pli rigidaj, laŭmezure kiel la aĝo altiĝas.
Kaj kiam oni forprenas unu solan ŝtonon el la konstruaĵo, tiu ĉi konstruaĵo disfalas: la individuo malkovras la angoron,kaj por esprimi tiun angoron, li ne retropaŝos antaŭ la murdo, nek la sociaj grupoj antaŭ la genocido aŭ la milito.
Oni ekkomprenas per kiuj mekanismoj, kial kaj kiel tra la historio kaj en la nuntempo establiĝis la hierarkiaj skaloj de superrego; por iri sur la lunon oni bezonas koni la gravitajn leĝojn, kio ne signifas, ke oni liberiĝas de la gravito, tio signifas, ke oni uzas ilin alimaniere por fari ion alian*.
Kompreni, ke la celeco de la individuo dependas de la celeco de la specio estas fundamenta afero.

*
* *

-----
*) Same, koni la fundamenton de nia nerva sistemo ne signifas, ke oni eskapas al la nekonsciaj mekanismoj, kiuj regas niajn kondutojn, sed tio ebligas al ni malfidi ilin kaj provi ilin utiligi alimaniere.

*Tiom longe, dum oni ne estos vaste diskoniginta tra la homoj de tiu ĉi planedo la manieron, per kiu funkcias ilia cerbo, la manieron, per kiu ili ĝin uzas, kaj tiom longe, dum oni ne estos dirinta al ili, ke ĝis nun tiu maniero ĉiam servis por superregi la aliulojn, estos malmulte da ŝanco, por ke io ŝanĝiĝu.*

**La kompilinto.**

**************************************************

BIBLIOGRAFIO en la franca :

**L'homme et la ville** (Flammarion, 1972)
**La nouvelle grille** (Laffont, 1974)
**Eloge de la fuite** (Idées Gallimard)
**Copernic n'a pas changé grand chose** (Laffont 1980)
**La colombe assassinée** (Grasset, 1983)
**L'inhibition de l'action** (Masson & Cie, 1979)
**Mon oncle d'Amérique** (filmo de Alain RESNAIS)

**************************************************



## LA MAGIO DE LA VORTOJ

*La vorto ne nur estas konvencia kodo,*
*Kolekto de pli aŭ malpli harmoniaj sonoj.*
*Ili povas esti kvazaŭ meteoroj,*
*Kiuj alportas al ni la esperon.*
*Ili povas esti kvazaŭ altvaloraj perloj*
*Dotitaj de magia povo : nur unu vorto*
*Kaj denove la ĉielo bluas.*
*Ekzistas vortoj,*
*Kiuj delikate parfumas niajn matenojn,*
*Harpe kantas en nia koro,*
*Dancas por ni la valson de l' feliĉo.*
*Ekzistas vortoj,*
*Tiel ravaj, ke ni al dezirus vangojn por kisi ilin,*
*Tiel mirindaj, ke ni emus ilin trinki*
*kiel viveliksiron.*
*Bedaŭrinde,*
*Estas vortoj, kiuj vergas, tranĉas, kondamnas,*
*Kalumnias, mensogas, insultegas,*
*Malbenas, ofendas, eĉ mortigas.*
*Nur unu el tiaj vortoj: ni malkovras la inferon.*
*Ni semu*
*Pacajn, fratecajn vortojn,*
*Kiuj estos saltotabulo por iri al la beleco,*
*la harmonio,*
*Kiuj sunigos niajn pensojn por pli serena ekzistado.*
*Ni vestu nin per*
*Florvortoj, muzikvortoj, flamvortoj*
*Por fajrigi la tenebrojn.*
*Ni ĵetu en la aeron*
*Vortojn kiel dolĉan nektaron*
*Por envolvi la mondon per ammantelo.*

..........................................................

*Mi metis flugilojn al ĉiu el miaj tekstaj vortoj*
*Por ke ili amikece vizitu vin*
*Kaj al vi transdonu miajn lumpensojn...*

**Michèle Freud**

**NIKOLIN'**

## el "ALKROĈE AL LA VIVO"

Elfrancigis : Emile Van Damme

Se kelkfoje
mi fuĝas en la makison de soleco
estas ĉar vundas min tro
la marasmo de la unutonaj kutimoj.
Estas ĉar brogas min tro
la trioloj de la vivo
kaj de amikoj.
Estas ĉar premas min tro
amasiĝo de malordo
kajeroj, paperoj, cindrujoj,
teleraro ĝisborde en lavŝtono,
vestaro vaganta en ĉifona tajdo.
Estas ĉar platigas min tro
la petoj centfoje ripetitaj
centfoje forgesitaj.
    Estas ĉar leviĝas en mi
    la deziro pri mi
    en krio
    ne muzelingebla.
    Estas ĉar leviĝas en mi,
    pli deliraj ol mi,
    huloj potencaj
    kaj varmigaj
    varmigontaj unue nur min.
Se kelkfoje
mi fuĝas en la makison de soleco
estas ĉar vokas min
fore de flankaj deĵoroj
estas ĉar vokas min
la renoviĝo
per silenta beateco.
Estas ĉar mi devas kun tujeco,
malkovri en mi
ree kaj ĉiam ree
tion kio estas sole mi.
Estas ĉar mi devas arigi
ĉion kio estas mi
kaj kio reiĝas, laŭmezure
kiel miaj paŝoj surstrate,
kio reiĝas mi-la-mondo
                    mi-la-aliaj.

La manĝo finiĝis:
nian malsaton
ni kuracis
kaj malhaste
ni ĝuadis la vinon.
La mastro rakontadis
pri la belaĵoj de la regiono
kaj niaj rigardoj ekheliĝis
per la lumo de lia rideto.
Li feliĉadis pro la rakonto
kaj vi, ĉu vi feliĉis
pro la aŭskulto?
aŭ ĉu... vi serĉis insulon
kie ripozigi
vian lacan kapon?

Tiam vi prenis vian tabakon:
Kun la simpla lerteco
de kutimo
vi rulis cigaredon.
Kelkfoje mi estis petinta vin
ruli iun por mi
sed ĉifoje
mi preteratentis,
aŭskultante la mastron
metante demandojn.
Tamen mi ne miris
kiam vi ĝin prezentis.
Estis tio ja rito
de iu forgesita meso
de iu alvoko
kiun forgesi ĝuste sufiĉas
por ke ĝin la alia rememoras.



*Ernesto CARDENAL*

### DENSIĜOJ KAJ VIZIO EN SAN JOSÉ DE COSTA-RICA

*Tie supre vokas la steloj*
*kaj invitas nin vekiĝi por la evolucio,*
*por la ekmarŝo en la kosmon.*
*Ili estis naskitaj el premo kaj varmo.*
*Kiel gaje iluminataj stratoj*
*aŭ urboj, nokte videblaj el aviadilo, ili vokas.*

*La amo, kiu briligis la stelojn...*
*La universo konsistas el unuiĝo.*
*La universo estas densiĝo.*
*Densiĝo estas unuiĝo el varmo (amo)*
*Kaj la universo estas amo.*
*Elektrono neniam volas soli.*

*Densiĝo kaj unuiĝo, tio estas la steloj.*
*La leĝo de la gravito*
***che move il sole e l'altre stelle***
*estas la altirforto inter korpoj, kaj la altiro ju pli fortiĝas*
*des pli la korpoj alproksimiĝas.*
*La altirforto de la ĥaosa materio.*
*Ĉiu sola molekulo*
*altiras ĉiujn aliajn molekulojn de la universo.*
*La plej rekta linio estas la kurbo.*
*Nur la amo estas revolucia.*
*La malamo ĉiam reakcias.*
*Varmo estas movo (agitado) de molekuloj,*
*kiel la amo estas movo (kaj la amo varmo).*
*Elektrono ĉiam volas aparteni al kompleta grupo aŭ subgrupo.*
*Ĉia materio estas altira.*
*La elektronoj turniĝas en elipsaj orbitoj,*
*tiel kiel la planedoj turniĝas en elipsaj orbitoj.*
*Ĉiu sola molekulo el la tero*
*altiras la lunon, la sunon, kaj la stelojn.*
*Pluvo falis en la nokto, kaj la bufoj kantas sub la suno,*
*ili kantas por la inoj,*
*vokante por la amo ilin.*
*Kaj unuiĝas la amantaj sin atomoj,*
*ĝis kiam tiom da atomoj kunas,*
*ke ili eklumas kaj estos stelo.*
*(Kaj kio okazas en la koito? Kiel ekestas nova vivo?)*
*Kaj de ili devenas la danco.*



*Inter stalagmitoj kaj stalagtitoj (lasta galerio)*
*Uro formita el la sama argilo kiel la kaverno*
*prisaltas urogalon formitan el la sama argilo.*
*Kaj sur la tero jenas spuroj, enargile plantoj kaj piedoj*
*de junuloj el la glacia tempo, kiuj dancis*
*kaj dancis antaŭ la uro kaj urogalo.*
*La dancon lernitan de la steloj.*

*Je dimanĉovespero kaj en Wall Street ĉasas griza vento*
*oldajn gazetojn sur la vaka strato. Wall Street kun steloj,*
*fantome kaj vaka. Senlumas la fenestroj de la bankoj,*
*sed ne ĉiuj. Kelkaj vicoj lumas*
*en la nigra amaso. Oni povas ekkoni ilin:*
*la eksterlandaj sekcioj de la grandaj bankoj.*
*La ferpordoj estas fermitaj per ŝlosiloj kaj stangoj.*
*Sed tra la posta enirejo paŝas figuroj*
*en la eksterlandajn sekciojn de la bankoj. La lumoj,*
*sekretaj kunsidoj.*
*Decidoj, pri kiuj ni scias nenion (kaj kiel la akcioj tiel la*
*fumoj de iliaj havanaj cigaroj suprengrimpas), sed kiuj ĉiuj*
*temas pri Ribelo en Malajo, pro la senvalorigo de la*
*enlanda mono, elbruligitaj busoj.*
*Sango fluas en la stratoj kiel akvo el hidranto.*
*En la sama horo, en kiu brilas la steloj super Wall Street*
*kaj en la horo, en kiu la bankoj en Londono malfermas la*
*pordojn.*

*Materio altiras materion*
*kaj per tia grado, per kia la densiĝo plifortiĝas,*
*kreskas ĝia altirforto. Ĉe samaj kondiĉoj*
*densiĝo de du milionoj mejloj diametre*
*efikigas la duoblan altiron kiel densiĝo de unu miliono.*
*Ju pli grandas la densiĝo despli grandas la ebleco*
*kreski kaj unuigi malgrandajn densiĝojn.*
*Ni supozu por ekzemplo, ke grandega amaso da samforma*
*gaso plivastiĝu en la kosmo tra milionoj da mejloj*
*en ĉiuj direktoj: ĉiu eta ŝanĝo*
*de la samformeco kapablas ekigi densiĝojn kaj densiĝojn*
*de ĉia imagebla amplekso.*
*La kapitalismo pasos. Vi ne plu vidos tiam*
*valorpaperan borson.*
*Tio certas kiel la alveno de printempo...*
*Mia vizio en San José de Costa Rica.*
*Kaj se la lasta venkita malamiko estos la morto,*
*tiam antaŭe pasos la egoismo.*

La homo tiom diferencos de la nuna homo, kiom tiu
diferencas de la sinantropo.
Konkuro malhelpas kunlaboron.
Diso regas inter homo kaj homo.
Disrompita homaro.
    La unua fiŝo
sufokiĝis. La unua fiŝo surteriĝinta estis kiel Che.
    Sed aliaj sekvis ĝin pli malfrue.
Ĉiu pensus, ke eta geno
tuŝanta nur malgrandan amason da gaso,
sekvigas densiĝon de nur eta amplekso.
Sed la gravito eĉ de la plej malgranda korpo
havas efikon en la tuta universo. La luno
kaŭzas fluson kaj malfluson sur la tero kaj sur la plej
foraj steloj.
Se infano terenĵetas ludilon,
ĝi konfuzigas la movon de ĉiuj steloj en la universo.
Tiom longe, kiom ekzistas la gravito,
neniu geno povos resti limigita
sur malpli granda spaco ol la tuto de la universo.

"La provo sturmatake okupi la ĉielon" diris Lenin
kaj ne iu malpli grava ol Lenin (la Pariza Komuno).
    Komune kaj persone, sen klasoj kaj ŝtato.
Nova homo kiel novaj kromosomoj.
Kiel simple: produkti kaj disdividi kion ni bezonas
    sur ĉi tiu ĉielkorpo
(La ekonomio ne estas komplika).

Ju pli emfazas la geno
des pli fortas la densiĝo,
sed eĉ la plej sengrava geno disvolvas
densiĝojn, eĉ se nur de febla intenseco.
Kaj ni jam vidis, ke la sorto de densiĝo
ne dependas de ties intenseco, sed de ties amaso.
Kiel ajn malforta la komenca intenseco estis,
la grandaj densiĝoj pli kaj pli grandiĝas,
dume la malgrandaj malaperas, glutite de la pli grandaj.
Kaj fine restos nenio krom kolekto de senfinaj densiĝoj.
Tiel ankaŭ la fenomenoj nomataj de ni socialigoj, kaj tiel
ankaŭ la revolucio.

La universo homogenas. La stelfragmentoj
en la geologia muzeo de South Kensington
pruvas, ke ili estas el la sama karno kiel ni.
    (Ankaŭ ni estas steloj).



"Ĉiela karno", diris Ruben.
    Kaj ni ankaŭ estas infanoj de l' suno,
    (la varmo de nia sango estas sunvarmo)
    naskita de steloj.
"Knabino mia, mi feliĉas en la montoj,
ĉar mi batalas la batalon de mia popolo."
    Kaj la batalo jam daŭras dudek mil milionojn da jaroj.

Sed: "La revolucio ne finiĝis en tiu mondo",
se ni ne venkis la morton.
Tiukaze por ĉiam regos la Status quo
la Status quo estas la morto.

Kaj mia vizio en San José de Costa Rica; nun mi volas
rakonti pri mia vizio - en taksio iuvespere,
kiam mi flugis en aviadilo al skribistkongreso.
Jen mia vizio: Neonreklamoj, apotekoj, aŭtoj,
knaboj sur motorcikloj, benzinejoj, koktelejoj, homoj en la
stratoj, malgrandaj knabinoj en lernejuniformoj, laboristoj
kiuj kunstaras.
    Kaj mi vidis kiel ĉio estis ordigita per la amo.
La koloro de pulovero parolis al mi pri amo.
Amo estis la benzino de motoroj kaj bruligis ĉi tiujn
lumojn - ĉiujn.
La modaj vestoj de la knabinoj, kio alia ili estis, se ne amo?
    Kaj infanoj sur la strato, unuigitaj per amo
kaj plantitaj per amo la ruĝe ardantaj arboj,
knabo kun longa hararo - longharara pro amo.
Reklamo: IMPERIAL. Kiu sciu kio ĝi estas? Sed certe io
por divido, por donaco.
Telefonĉelo, kaj iu telefonanta pro amo,
patrino kaj infano surstrate, alia amo,
dense interligiĝinta paro, kaj denove amo,
graveda virino ŝvelinta pro amo.
Mia taksio pluveturas. Du ĉe angulo, unu el ili rakontas
ion (certe amikoj)
    Kaj mi pensas:
    Grandioza besto estas la homo.
Rostita koketo, sukeraĵejo... ankaŭ tio estas amo.
Iu rapidas. Kien li iras? Al renkonto,
al festeto, en domon, kie li amas.
Alia portas panon. Por si kaj por aliaj. Komunio.
Hele iluminitaj restoracioj: ankaŭ ili por renkonto.
Pilsenbier: ĝi aŭguras pri unuiĝo, kunsido
    COCA COLA
(ĉi fi-trinkaĵo) sed hodiaŭ la reklamo literumas:
KOMUNIO

*Grandioza speco, kiom mi amas la homojn,*
*ĉiuj kreitaj en amkoito*
*ĉiuj naskitaj por ami.*
*Kaj mi komprenis, ke belas morti por aliaj.*
*Tio estis mia vizio iuvespere en San José de Costa Rica.*
*Ankoraŭ ĝemas la tuta mondo en la komercaj reklamoj*
*pro doloro pri la ekspluato de homoj far aliaj homoj.*
*La tuta mondo*
*postulis, postulis krie*
*la revolucion.*

Tiun poemon verkis la nuna kulturministro de Nikaragvo Ernesto Cardenal. Kiam li skribis tiun poemon, li ankoraù batalis kontraù la eksa diktatoro Somoza. El la germana versio tradukis **Hagen Hirte**

******************************************************

... malfeliĉo, hodiaù, estas ĉies patrujo, la nura tera reĝlando, kiu respondis al la Promeso. **Albert CAMUS**

**VIVI**

Vivi estas naski
Kaj vivi estas murdi
Vivi estas ami
Sed estas ankaŭ abomeni
Vivi estas konstrui
Sed ankaŭ detrui
Estas plugi kaj dispiti
Estas donaci kaj estas ŝteli.

Vivi estas ĝui kaj estas suferi
Estas elteni kaj estas forĵeti
Estas aserti sin aŭ sin kaŝi
Ordoni aŭ obei
Disvolviĝi aŭ velki
Sin liberigi aŭ sin enkatenigi

VIVO estas beleco
Ĝi estas ankaŭ malbelegeco
Ĝi estas espero kaj malespero
Tenereco kaj seksperforto
Sereneco aŭ milito
Bonŝanco aŭ malbonŝanco
Lumo aŭ mallumoj

Sanstato poste malsano
Fortikeco poste kadukeco
Koncentriĝo poste eksplodfino

VIVI estas konscii pri Eterno
Aŭ timegi pro la mallonga trairo
Estas balanci de ardeco ĝis
glaciiĝo
Ne estas feliĉo sen sufero posta
Ne ekzistas unuiĝo sen posta
disiĝo
Vivi estas
Elspezi sangon kaj oron
por memekstermo
Aŭ sin detrui servante la aliajn
Estas tute unu KAJ tute la
alia

VIVO ricevas signifon
nur kiam oni vivis ĝin.

**Renato GIEURE**



**Nia felietono :**

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO
**de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)**
(resumpecoj)

## POR INTERKOMPRENO PERFEKTA NECESAS PAROLO EKZAKTA
(el la 4a ĉapitro)

La ordinara pensado estas nepreciza; la lingvaĵo aŭ parolo estas subjektiva; la vortoj estas adaptitaj al la necesoj de l' praktika vivo. En pli kompleksa regno, neniu komprenas aliajn.

Du homoj diras la samon per malsamaj vortoj, kaj senfine diskutas nesuspektante ke ili diras la samon; aŭ du homoj uzas la samajn vortojn imagante ke ili akordiĝas, ke ili interkomprenas, sed fakte ili priparolas absolute diferencajn aferojn, kaj ili eĉ minimume ne komprenas unu la alian; ĉiu el ili uzas vortojn kun specialaj sencoj kiujn aliaj homoj eĉ ne suspektas.

Ni vidu, ekzemple, la vorton: HOMO. Persono zorgema pri la sekso pensas: ĉu viro aŭ virino? ĉu masklo aŭ femalo? PIA (religiema) persono sin demandas: ĉu kristano aŭ ne kristano? ĉu mahomedano aŭ ne mahomedano? KURACISTO: ĉu sana aŭ malsana? SPIRITISTO pensas pri la homa vivo en la transmondo. ADVOKATO pensas pri statistika unuo, pri potenciala krimulo aŭ ebla kliento. MORALISTO rigardas la homon laŭ sia ideo pri bono kaj malbono. NATURALISTO konsideras la homon laŭ zoologia klasifiko. ktp. ktp.

La homoj ne rimarkas ĉiujn ĉi tiujn kontraŭdirojn; la homoj ne vidas ke ili ĉiam priparolas malsamajn aferojn; sekve, por ekzakta interŝanĝo de pensoj (interkompreno) necesas aŭ nepras ekzakta lingva instrumento, ekzakta lingvaĵo aŭ parolo kiu permesu tuj precizigi kion oni diras, laŭ kiu vidpunkto kaj rilate kion. Ekz.: ĉi tie ni parolas laŭ la vidpunkto de l'EVOLUO, rilate la HOMON.

Ĉi tiu ekzakta lingvaĵo baziĝas sur la principo de relativeco. En ĉi tiu lingvaĵo ĉiuj ideoj estas konsiderataj en siaj reciprokaj rilatoj laŭ la vidpunkto de ununura ideo: la evoluo; ne meĥanika evoluo, sed konscia kaj vola (aŭ volanta) kiu estas la sola ebla evoluo. Nenio evoluas meĥanike.

Tial, ni devas uzi, anstataŭ la vorton HOMO, 7 vortojn kiuj estas HOMO 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7. En HOMO 1 la centro de gravito de lia psika vivo estas la instinkta-mova centro (scio de papago!). En HOMO 2 la centro de gravito de lia psika vivo

estas la emocia centro (scio de kio plaĉas al li). En HOMO 3 la centro de gravito de lia psika vivo estas la intelekta centro (scio subjektive logika). En HOMO 4 la centro de gravito de lia psika vivo estas permanenta - ekvilibraj centroj - (survoje al la objektiva scio!). En HOMO 5 same kiel 4, sed lia centro de gravito kristaliĝis (solidiĝis); li posedas neŝanĝeblan egoon aŭ memon, la konscion pri si, la realan volon. HOMO 6 posedas la tuton de l'scio alirebla al HOMO, sed li ankoraŭ povas perdi ĝin. HOMO 7 posedas objektivan kaj tute praktikan scion pri la tuto.

Nun, ni vidu alian vorton: MONDO. Kristano rilatigas ĝin al la ideo de Dio, al la mondokreo, aŭ al la mondofino, ktp. Teozofo pensas pri la malsamaj mondoplanoj fizika, astrala, mensa kaj kaŭza. Spiritisto pensas pri la transmondo, pri la mondo de l' spiritoj. Fizikisto pensas pri la mondo de molekuloj, atomoj, elektronoj, el la vidpunkto de la materia strukturo. Astronomo pensas pri la mondo de steloj kaj galaksioj. Sekve por kompreni sin reciproke oni devas determini el kiu vidpunkto oni konsideras la vorton MONDO.

Pri la senco de l'vorto MONDO ni devas kompreni ke estas multaj mondoj, kaj ke ni vivas ne en unu sola mondo, sed en pluraj mondoj, tamen ni vivas en malsamaj mondoj kun kiuj ni rilatas malsame, do, la mondoj estas enhavataj unuj en aliaj.

Mondo de l'homoj, organika vivo, Tero, ĉiuj planedoj, la Suno, ĉiuj sunoj (nome nia galaksio aŭ Lakta Vojo), ĉiuj galaksioj. Kaj ĉiuj ĉi tiuj mondoj konsistigas tuton aŭ unuon: ABSOLUTO kiu estas sendependa ĉar inkludante ĉion en si mem, ĝi dependas de nenio.

La homo vivas en ĉiuj mondoj, sed laŭ malsamaj manieroj.

## KONI LA HOMAN MAŜINON
(el la 1a ĉapitro)

Ĉiuj homoj estas maŝinoj regataj de eksteraj influoj. (Ĉi tio rilatas al la homoj 1 - fizika -, 2 - emocia - kaj 3 - intelekta ).

Sekve, arto, poezio, literaturo, penso, scienco (ktp) estas mekanikaj manifestiĝoj, ĉar se la homoj estas maŝinoj, de la maŝinoj oni ne rajtas atendi ion alian ol mekanikajn reagojn. Sed eblas ĉesi esti maŝino, kvankam por tio necesas, antaŭ ĉio, KONI LA MAŜINON.

Por tio, la homo, antaŭ ĉio, devas KOMPRENI iujn aferojn. Li havas milojn da falsaj ideoj kaj falsaj konceptaĵoj, precipe pri si mem kaj nur per nova scio li povos liberiĝi de ili.

Fakte, oni devas kapabliĝi por koni tion kio estas la vero kaj kio, la mensogo, ĉefe, en si mem. Sed ĉi tion neniu scias... kaj neniu volas scii.



## KRISTALIĜO : FANDIĜO DE INTERNAJ KVALITOJ
(el la 2a ĉapitro)

La maŝino-homo, por kiu ĉio dependas de eksteraj influoj, al kiu ĉio okazas, kiu nun estas ia ulo, kaj alia je la sekva momento, kaj pli malfrue, tria, havas nenian estontecon: Tia homo estas "enterigita", kaj tio estas ĉio. LI ESTAS NUR POLVO KAJ AL LA POLVO LI REVENOS. Ĉi tiuj vortoj aplikiĝas al li. Por ebligi postmortan vivon de kiu ajn ordo, devas okazi iu kristaliĝo, iu fandiĝo de internaj kvalitoj en la homo.

Ekzemple: Zelota, fanatika kredo povas estigi en homo la formiĝon de tiel fortaj permanentaj trajtoj ke okazas en li tio nomata KRISTALIĜO. Io kristaliĝas en la homo - io malmola - en la senco ke ĝi estas fiksa, permanenta, neskuebla.

En la PSIKOLOGIO TRANSFORMISTA la termino "KRISTALIĜO" estas uzata por priskribi iun gradon de interna fandiĝo de kvalitoj.

La PSIKOLOGIO TRANSFORMISTA konsistigas duan edukon! "Vere mi diras al vi: Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kvazaŭ infanoj, vi neniel eniros en la regnon de la ĉielo" (S.Mateo 18-3). La signifo de ĉi tiu frazo estas ke homo, troviĝante kun ĉi tiu instruo, <u>devas</u> rekomenci (:renaskiĝi!) kaŭze de la misaj ideoj aŭ sintenoj, kaj de la misa disvolviĝo kiun la vivo al li donis, kaj tio estas des pli malfacila, se estas iu grado de kristaliĝo, se en lia interno formiĝis pli aŭ malpli permanentaj trajtoj. Homo povas kristaliĝi laŭ misa maniero, nome, sur misa bazo, ekzemple, la timo al la peko, al la infero, povas veki teruran lukton inter la jesoj kaj la neoj (nome, inter tio, kion li intencas atingi kaj tio kio oponas ĝin). La timo estas neĝusta bazo por la kristaliĝo, ĉar la timo estas negativa! Por ke la kristaliĝo estu ĝusta, la lukto inter la JESO kaj la NEO devas establiĝi en supera nivelo de kompreno. (Nome, en la emociaj kaj intelektaj partoj de l'centroj, por aktivigi la superajn centrojn emocian kaj intelektan). Homo ne devas kristaliĝi en la mekanikaj (aŭ motoraj) partoj de l'centroj, nek en la negativaj partoj!

## <u>LA 3 VOJOJ</u> : LA VOJO DE L'FAKIRO, LA VOJO DE L'MONAĤO, LA VOJO DE L'JOGANO
(VOJO : Psikologie, VOJO signifas internan transformiĝon)

La vojoj sin oponas al la ĉiutaga vivo kiu baziĝas sur aliaj principoj kaj estas submetita al aliaj leĝoj. Jen la sekreto de ilia povo kaj de ilia signifo. En ordinara vivo, kvankam ĝi povas esti plena de interesoj religiaj, artismaj, filozofiaj, scien-

caj, politikaj aŭ sociaj, troviĝas NENIO KAJ NENIO TROVEBLAS EN ĜI, kio proponas la eblecojn enhavatajn en la vojoj; ĉar ĉi tiuj kondukas aŭ povas konduki la homon en la senmortecon. La monduma vivo, eĉ la plej sukcesa, kondukas en la morton kaj ne povas konduki en ion alian. La ideo pri la vojoj ne povas esti komprenata se oni akceptas la eblecon de l'homa evoluo sen ĝia helpo. Laŭ ĝenerala maniero, se ni konsideras la personojn, kiuj estas nek fakiroj, nek monaĥoj, nek joganoj, kaj pri kiuj ni rajtas sentime aserti ke ili neniam atingos tion, ni estas en kondiĉo aserti kun absoluta certeco ke iliaj eblecoj ne povas esti disvolvitaj kaj ke ili neniam disvolviĝos. En la ordinaraj kondiĉoj de l'civilizita vivo, la situacio de homo, eĉ inteligenta, kiu serĉas la KONON, estas senespera, ĉar li malhavas la plej etan eblecon trovi ĉirkaŭ si ion, kio similas al lernejo de fakiroj aŭ de joganoj, kaj fariĝi monaĥo, ne multe logas lin. La situacio estus fakte senespera, se ne ekzistus alia ebleco, tiu de 4a vojo, kiun sekvas sagaculoj!

## LA KVARA VOJO: LA VOJO DE L'SAGACA HOMO

La 4a vojo ne postulas ke oni apartiĝu el la mondo; ĝi ne postulas ke oni forlasu ĉion por kio oni vivis ĝis tiu momento. Trairi la 4an vojon necesigas pretiĝon. Ĉi tiu vojo ne havas difinitan formon; antaŭ ĉio, oni devas trovi ĝin. Ĝia komenco facilas pli ol la aliaj 3 vojoj, ĉar ĝi ne postulas la mond-forlason; ĝi postulas nur la komprenon. La fundamenta principo de l' kvara vojo estas ke ju pli homo komprenas kion li faras, des pli da valoro havos la rezultoj de liaj fortostreĉoj.

En la 4a vojo, homo devas certiĝi per si mem pri la vero de tio kion oni diras al li, kaj dum li ne akiris ĉi tiun certecon, li nenion devos fari. Eĉ pli, en la 4a vojo, eblas individuigi la laboron de ĉiu, nome, ĉiu devas fari nur tion, kio por li estas necesa, kaj nenion el kio ne havas utilon por li.

Ĉar la 4a vojo flankenlasas ĉion superfluan kion oni praktikadas en la aliaj 3 vojoj nur pro rutino!

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO.

*************************************************************

**Krucvortoj. Solvo de L! 74.**

**Hor. :** 1. ĈIAMANIERE. 2. INTELEKTUL. 3. OFER. EĜA. 4. MANLABORIL. 5. ANTONETA. 6. NOA. ANONCO. 7. NEGAS. AZ. 8. ANTRA. KARI. 9. NI. ALLOGI. 10. TETR. APODO. 11. ALBATROSON.

**Ver. :** 1. ĈIOMANGANTA. 2. INFANO. NIEL. 3. ATENTANT. TB. 4. MERLO. ERARA. 5. AL. ANAGAL. 6. NEEBENA. LAR. 7. IK. OTOSKOPO. 8. ETERAN. AGOS. 9. RUĜI. CARIDO. 10. ELALMOZI. ON.

# Ĉies voĉo

**Jakelino :**

### NACIO NE ESTAS MEZEPOKA KONCEPTO

Mi legis kun intereso la kontribuon de la anonima Justo, kaj konstatas, ke li estas tre kritikema kontraŭ Mezepoko. Ofte liaj asertoj pri tiu epoko estas malpravaj.

Ekzemple, li asertas: tradiciaj konceptoj kiel nacio, armeo, religio, eklezio konservas la saman signifon kaj valoron kiel en la Mezepoko.

Nu, mi tute ne certas, ĉu la vorto "nacio" havis signifon por mezepoka eŭropano. Se mi estas ĝuste informita pri la historio de la apudrejnaj ŝtatoj:
- dum la plej granda parto de la Mezepoko, la prapatroj de la nuna FRG-anoj estis regatoj de la Sankta Romia Imperio. La vortoj: "de la germana nacio" aldoniĝis nur fine de la Mezepoko. En la akiro de la koncepto "nacio" en Germanio ludis gravan rolon luteranismo, laŭ kiu la reganto de la ŝtato devas esti ankaŭ la reganto de la eklezio. Antaŭ la Reformacio, estis konstanta rivalado inter la papo kaj la imperiestro.
- en Francio, la principo "la nacio estas suverena" aperis nur en 1789. La mezepokaj prapatroj de la hodiaŭaj francaj civitanoj estis regataj de feŭdestroj. Nur poste la reĝoj de Francio akiris povon, kaj ĝis 1789 la unueco de ĉiuj regatoj realiĝis per la obeo al la sama reĝo, sendepende de iliaj naciecoj.

***VALO :***

### *NI REVENU AL LA FONTO*

*En sia tiutitola artikolo nia simpatia samideano A.Lopez-Luna prave admonis nin rezisti al la invado de neologismema tendenco (L! 74, p.44-45). Sekvis mia artikolo "Ĉu riĉeco?", en kiu mi diris: tro estas tro! Kaj mi tion rediras.*

*Ni ja ne tro kompliku nian lingvon, sed ankaŭ ni ne tro simpligu ĝin. Inter du trooj - trokompliko kaj trosimpligo, Zamenhof per sia ekzemplo montris al ni ĝustan mezan vojon. Mi notis, ke li mem iniciatis multajn neologismojn en la sekvo de sia verkaro, sed jam en la komenco li evitis troan*

*simplecon. Li ne uzis la matematikan konjunkcion "plus"*, sed li faris distingon inter "pli" kaj "plu", inter "de" kaj "da", inter "ju" kaj "des", inter "pli" kaj "plej".*

*"La plej bona maniero honori la memoron de la aŭtoro aŭ iniciatoro de esperanto" estas certe celkonscie imiti lian simplan kaj klaran stilon, ne tro "riĉigi" la vortaron, sed ankaŭ ne tro malriĉigi ĝin. La lingvo de Zamenhof estas sufiĉe riĉa en sia tuta amplekso: ni plene uzu ĝin, kaj ne strebu limigi ĝin al iu "basic"-Esperanto.*

*Ni fosu nian sulkon kaj prisemu ĝin per niaj propraj grajnoj, kaj per originala kulturado ni preparu riĉajn rikoltojn. Ni uzu la riĉigajn eblojn de la esperanta vortfarado tia, kia ĝin kreis Zamenhof, kiu mem ĝin lerte ekspluatis, same kiel Kabe, Grabowski kaj ceteraj, kaj inter ili kelkaj pli modernaj, kiel R. Schwartz kaj Lanti. Tiuj montris al ni tiun sekvindan mezan vojon, kiu estas tiu de prudento.*

**P.M.G. :**

**Ĉu la evoluo de Esperanto estas spekulativa afero?**

Multaj pensas, ke la evoluo de Esperanto havos du formojn formojn: 1. Riĉigo (senfina "riĉigo"!) per novaj ofte senutilaj vortoj kaj gramatikaj komplikaĵoj, ambaŭ laŭ modelo de naciaj lingvoj. 2. Simpligo kaj faciligo per arkaismigo de sen-utilaj vortoj kaj formoj laŭ la logikaj kaj sciencaj principoj de Esp-o.

Mi ne scias, kial la unua formo estas tre oficiale akceptita dum la dua estas tolerata kiel spekulativaĵo... dum estas evidente, ke lernas Esperanton tiuj, kiuj ŝatas simplan kaj facilan Internacian Lingvon. Tiuj, kiuj ŝatas komplikaĵojn, lernas la "grandajn lingvojn", kelkaj lernas ankaŭ Esperanton, sed nur kiel amuzaĵon sen deziri ĝian disvastiĝon kaj praktikan uzadon.

***VALO :***

***PRI NEOLOGISMOJ KAJ ALIAJ AFEROJ***

*Povas okazi, ke verkisto post sufiĉa pripensado ne trovas alian rimedon por esprimi sian penson ol la uzon de neologismo ne trovebla en PV aŭ PIV. Tiaokaze, li almenaŭ klarigu ĝin por tiuj legantoj, kiuj ne konas ĝin.*

*Iam en **Laŭte!** mi skribis: Ĉi-jare graŭ malseka vetero, la kamparo estis tre verda. Kion signifas tiu vorto "graŭ"? Nu, la malon de malgraŭ, de kiu ĝi venas per "inversa derivo", kiel "fraŭlo" venas de "fraŭlino" (el la germana "Fräulein"). Ĝi do estas iel sinonimo de "dank'al" aŭ "pro".*

-----

* Zamenhof ne diris "du plus du" nek "du pli du", sed "du kaj du estas kvar"



*Ekstremorienta kamarado demandis min pri tiu frazo, kaj ankaŭ pri: Pluku la tagon, kaj pri la Danaidinoj. Pluku la tagon estas laŭvorta traduko de la latina **Carpe diem**, kiu signifas: pluku la floron de la hodiaŭa tago, t.e. : ĝuu en ĉiu tago la plezuron, kiun ĝi kunportas. La Danaidinoj estas la 50 filinoj de la legenda reĝo Danao. Laŭ la greka mitologio ili estis kondamnitaj plenigi senfundan barelon. La barelo de la Danaidinoj estas ofte citata en la tradicia literaturo de okcidenta kulturo kiel simbolo de neplenumebla, senfina tasko.*

*Simile la roko de Sizifo. Tiu reĝo-rabisto estis kondamnita ruli ĝis la supro de monto rokon, kiu senfine retroruliĝis de la supro, kaj li devis rekomenci ĉiufoje la lacigan taskon. Zamenhof komparis la kreadon de lingvo arta al sizifa laboro.*

*Tiaj citaĵoj aŭ aludoj apartenas al la trezoro de naciaj aŭ etnaj tradicioj, do al tiu de la homaro. Ilin enkonduki en esperanton estas riĉigi nian komunan trezoron; sed ofte ili necesigas klarigon por alilingvaj legantoj.*

*Mi notas, ke pri Danao, danaidinoj, kiel pri Sizifo, plenaj klarigoj troviĝas en PIV. Mi supozas, ke ĉiu leganto de L! posedas aŭ disponas ekzempleron de tiu nemalhavebla vortaro. Do, kiam li legas vorton aŭ esprimon de li nekonatan, li serĉu en sia PIV: ofte li trovos en ĝi la necesan klarigon.*

**Pri religiaj kaj kontraŭreligiaj kredoj**

La konkludo de Edgard JAMART : "dum sia komenco religio eble suferas sed post sia sukceso ĉiam ĝi suferigas" estas prava, sed ĝi estas tro parta: tiom mia persona sperto, kiom mia kono pri la historio de la 20a jarcento, klare montras al mi, ke ekzakte same evoluas ideologioj, kiuj ne referencas al dioj, kaj ideologioj, kiuj pretendas liberigi homojn el dioj. La gulagoj de nia jarcento ne valoras pli ol la ŝtiparoj de la pasintaj jarcentoj.

La transiro de katolikismo al malkatolikismo liberigas neniun, krom, se ĝi estas nur mallonga etapo survoje al memstara pensado. Mi eĉ rimarkis, ke konvertitoj, kiaj ajn estas iliaj novaj konvinkoj, estas pli fanatikaj ol la denaskaj adeptoj de la kredoj, al kiuj ili aliĝis.

Tiom el la vidpunkto de individua psikologio, kiom el la vidpunkto de la historio de socioj, la kredo, ke ne ekzistas dioj, funkcias ekzakte same, kiel la kredo, ke ekzistas dio(j). La nura diferenco, kiu efektive gravas, estas la diferenco inter la ideologioj de la regantoj kaj la ideologioj de la sub-

prematoj. Se homo estas edukita sen religio, li provu atingi la idealon de liberpenso, kiu ampleksas toleremon al alies pens-manieroj. Se homo estis edukita kiel kristano, li provu atingi la idealon de kristaneco, kiu ampleksas amon eĉ al la malamiko. Mia persona dialogado kun alipensantoj montris al mi, ke praktike la diferenco ne estas tiom granda, kiom kredas ambaŭflankaj fanatikuloj.

Tial mi proponas tiel ŝanĝi la konkludon: ia ajn kredo, dum sia komenco, eble suferas, sed, se ĝi akiras regpovon, ĝi suferigas.

**Jacqueline Lépeix**

## SIFILISO KAJ S.I.D.A.

En la jaro 1525-a okazis batalo apud Pavio (Italio) inter hispanaj kaj italaj trupoj aliancitaj kontraŭ francaj trupoj. Kiu venkis aŭ malvenkis en tiu batalo ne interesas nin: kio interesas nin estas scii, ke tiu okazaĵo signis la disvastigon de la infekta malsano nomata Sifiliso. Tial hispanoj kaj italoj alnomis ĝin "la franca malsano"; dum francoj diris "la itala malsano".

Sifiliso ruinigis la vivon de miloj kaj miloj da geeŭropanoj, kiuj vidis aperi sur sia korpo nekuraceblajn kaj nekaŝeblajn ulcerojn. La tiamaj kuracistoj ne volis (kaj ne sciis) helpi tiujn malsanulojn, ĉar la kuracistoj mem timis infektiĝi. Sifilisuloj estis komparataj al lepruloj kaj ĉiuj apartiĝis el ili. Ili estis malŝatataj kaj neniu akceptis ilin en sian domon. Ĝis la apero de la penicilino, kvar jarcentojn post la batalo apud Pavio, tiu hereda infekta seksa malsano estis plago por la homaro. Sed kie ĝi originis? Ekzistas iu hipotezo, kiu certigas, ke ĝi devenis de Ameriko, kiun Kristoforo Kolumbo estis malkovrinta por blankuloj kelkajn jarojn antaŭe, en 1492-a.

Tamen inter la praloĝantoj de Ameriko sifiliso estis tute nekonata. Ne ekzistis sifilisuloj inter la indiĝenoj, kiam Kolumbo alvenis.

Sed nun ni, kiuj vivas en la lasta kvinono de la 20-a jarcento post Kristo, vidis aperi en la mondo alian misteran seksan malsanon: **S i d a** (Sindromo de Imuno-Difektiĝo Akirita), kiun nia medicino ne kapablas kuraci. Ankaŭ sidauloj estas malŝatataj kaj ĉiuj timas ilin kaj ilin apartigas. Eĉ niaj kuracistoj ne multe ŝatas okupiĝi pri tiuj malsanuloj.

Sida prezentiĝis unue inter gesamseksemuloj, sed nun ni ĉiuj konscias, ke ĝi povas infekti iun ajn, eĉ sen havi seksajn rilatojn kun sidauloj. Sed kie ĝi originis? Ĝi originis en Usono - ĉi tio ne estas hipotezo, sed fakto - kaŭze de eksperimentoj tie faritaj por eltrovi novajn armilojn (mortigilojn). Ili manipulis ion kaj io elŝteliĝis. Usonaj militistoj scias perfekte ĉi tion, tamen ili igas kuri la famon, ke tiu malsano originis en Centra Ameriko, inter mestizoj...

Tiu ĉi plago, kiu minacas nin ĉiujn kaj kiun usonanoj disvastigis tra la mondo, superas dekmiloble la malbonaĵojn, kiujn la atombombo kaŭzis al la japana

(daŭrigo → p. 59)



Edgard JAMART :

## IMPRESOJ PRI SANKTA LANDO

Kiam oni vojaĝas al Sankta Lando, veninte de Egiptio per aviadilo, oni superflugas Monton Sinajo, meze de la dezerto, sur kiu staras monaĥejo, kies formoj estas neprecizaj pro la alteco. Jam oni spertas ian sanktecon je la vido de l' impona konstruaĵo, starigita de la homo por la gloro de lia Dio. Li kredas, ke Moseo ricevis tie la tabelojn de la dia leĝo. Unue destinitaj al la Hebreoj, ili estos honorataj de religioj pli malfrue kreotaj. Krom la Judoj, ankaŭ kristanoj kaj muzulmanoj estos nomataj popoloj de la Libro, la Biblio, kolono de la fido al la ununura Dio.

Palestino estas vere sankta lando por la tri religioj. Piuloj preĝas en sinagogoj, moskeoj kaj preĝejoj.

Komentoj pri la glora kaj tragika estinteco de la Izraeloj estas superfluaj: la ploroj de la Muroj de Lantoj resumas ilian tutan historian situon.

Mahometo altiĝis al la ĉielo, de Jerusalemo, asertas adorantoj de Alaho. Sed, kiam oni elvokas la Sanktan Landon, la kristana bildo ĉefe prezentas sin al ni.

Ne estas facile imagi la urbon tia, kia ĝi estis en la epoko de Jesuo Kristo. Se la ĝardeno de olivarboj proponas ankoraŭ sufiĉan trankvilecon por meditado, la sincera kredanto neniam rekonos la krucan vojon, en tiu mallarĝa kaj brua strato de la komerca kvartalo. Plia enmemiĝo ne eblas meze de tiu kurioza homamaso, kiu plenigas senĉese la preĝejon de Sankta Tombo ĉe Golgoto. La enirejo al la loĝio, kiu eble enhavis la korpon de Jesuo, estas malalta. Oni surgenuiĝas kelkajn sekundojn sub akra rigardo de rusa ortodoksa pastro, kaj oni pli pensas pri teatraĵo! Tiuj monakoj estas la gardistoj de la sanktaj lokoj; ili ne forgesas almozpeti en la plej favoraj lokoj. Ni scias nun, ke delegitaro de sovetia estraro vizitis lastatempe Izraelion por diskuti pri konservo de la bienoj de la rusa eklezio.

En Betlehemo oni vizitas la bazilikon de la Naskiĝo. Tra subtera vojo oni venas al la ora stelo, kie la dia bebo supoze naskiĝis. Ankaŭ tie ĉi tro da personoj malhelpas mediton.

Jordanio regis tiujn urbojn, kiam mi vizitis ilin. Muro, antaŭulo de tiu de Berlino, apartigis landlime Jerusalemon inter ambaŭ popolojn.

Judoj kaj Araboj, muzulmanaj kiel kristanaj, malamis sin. Post militoj Izraelio aneksis teritoriojn; pasioj paroksismiĝis.

Jam rifuĝintoj forkuris kaj kreis aliajn kampadejojn. Ili

transformiĝis en murdistojn, nomatajn ankaŭ teroristoj.

Kie estas nun tiuj Palestinanoj, kiuj loĝis ĉe la bordo de Jordano kaj meze de la ruinoj de Jeriko? Ili estis pitoreske vestitaj, kaj kiel siaj prapatroj ili revenis gracie de la malproksima fonto, kun argila botelego sur la ŝultro.

En tiu lando mi renkontis la plej belajn personojn, kiujn ĝis nun mi iam povis rigardadi. La inaj vizaĝoj similis al tiuj de virgulinoj kun bluaj okuloj kaj belaj haroj, kiel pentris famaj pentristoj. Oni asertas, ke ili estas posteulinoj de blondaj mezepokaj krucmilitistoj.

Ĉu sankteca stato estas najbara de perforto? Laŭ bibliaj rakontoj, loĝi en Palestino ne estis ofte ripoza! Poste, tiu lando spertis muzulmanajn konkerojn kaj batalojn de katolikaj armeoj, kiuj volis liberigi la tombon de Kristo.

Paco en Izraelio kaj ĉirkaŭaj landoj ne estas ankoraŭ proksima. Nun, politikaj kaj raciaj problemoj superas religiajn; malamo kreskas.

Ni esperu, ke fine Dio repacigos ĉiujn siajn servistojn, de kiu ajn religio ili estas.

***VALO :***

### *IOM PRI TEOLOGIO*

*Al Dio dank' ! mi estas ateisto. Do ne teologo. Laika en tiu fako, mi tamen arogos al mi pritrakti teologiajn demandojn.*

*1. Laŭ la romkatolika Eklezio, Dio estas unu en tri personoj: la Patro, la Filo, la Sankta Spirito. Tiel estu, mi ne kontestas, kaj ne postulas klarigon pri tiu mistero.*

*Do Maria estis samtempe:*

*- Di-ido, ido de Dio la Patro, kiel ni ĉiuj.*
*- Di-edzino, ĉar gravedigita de la Sankta Spirito.*
*- Di-patrino, ĉar ŝi naskis la Filon.*

*Bone, ĉio ĉi estas klara kaj glata.*

*Ĉu ŝi estis virga, la Sankta Virgino?*

*Oni ofte parolas pri Senmakula Koncipo. Temas pri relative freŝdata dogmo (1870), sed kion ĝuste ĝi signifas, kiun profundan sencon kovras tiu vorto? Pri ĝi estas konfuzo kaj eraro, eĉ en PIV. Ĝi ja signifas, ne ke Maria estis senpeke koncipinta, ke ĝi koncipis sen "peko" (ĉar por kristanoj koito estas peko) - sed ke ŝi estis koncipita senpeka: t.e., ke ekde sia koncipo, jam en la utero de sia patrino Anna (tiu ĉi normale graveda), ŝi estis per escepta Di-favoro deŝarĝita de la virgina peko, kiu pezas sur ĉiuj homoj de post Eva kaj Adamo.*



*Kompreneble, tiu nova dogmo iel konfirmas la antikvan pri la virgeco de Maria: ĉar se ŝi estis denaske, eĉ dekoncipe senpeka, ŝi ne estis pekipova. Do ŝi estis virga, tio estas tute klara.*

*Cetere, ni legu la kredkonfeson de la protestanta Reformita Eklezio en Francio:*

*- Mi kredas pri unu Dio, la ĉiopova Patro, kreinto, ktp.*
*- Mi kredas pri Jesuo Kristo, Lia unika Filo...*

*Ĉu unika? Ĉu do ni ne ĉiuj estas egale filoj de la komuna Patro? Jes, amataj filoj ni ĉiuj estas, sed nur Jesuo estas biologia filo de la Sankta Spirito. Ankaŭ pri tio ne estas dubo.*

*Mi daŭrigas la legadon: ..."koncipita de la Sankta Spirito, naskita de la Virgino Maria..." Do ŝia virgeco estas agnoskita vero, al kiu ni devas kredi. Kvankam...*

*Unue mi observas, ke ne ĉiuj protestantaj sektoj sekvas en tiu kredo la Reformitan Eklezion. Ne nur ili:*

*Laŭ la judoj, Jesuo estis ne Filo de Dio, sed uzurpisto kaj ĉarlatano.*

*Laŭ la islamanoj, li estis aŭtenta profeto, sed nur homa, sen dieca karaktero.*

*Eĉ iuj katolikoj dubas pri la Sanktaspirita koncipo kaj la virgeco de Maria. Sed tiuj ĉi estas herezuloj, indaj eterne bruladi en infero, kompatindaj!*

*Fine, kontestas ankaŭ la raciistoj, ĉar la biologio instruas al ili, ke en la homa specio ne ekzistas partenogenezo, t.e. natura gravedo sen antaŭa koito. Kaj eĉ en artefaritaj modernaj teknikoj, necesas prisemi la ovulon per spermatozoido.*

*Ĉu do Maria estis virga? La demando restas diskutebla kaj ne solvita.*

*2. Ĉu ŝi restis virga eĉ post sia edziniĝo?*

*Mi diris: por kristanoj koito estas peko. Eĉ en la geedzeco, kvankam en tiu okazo ĝi estas permesata (pro oportunismo, ĉar necesa al la reproduktado de la specio). Tamen Lia Sankta Moŝto la Papo rekomendas al geedzoj en la permesata sekskuniĝo sin deteni de tro arda sensoĝua deziro, ĉar ĝuste en tio ĉi kuŝas la peko.*

*Parenteze: kial Dio donis al ni tiun ĉi ardan deziron kaj tiun interesan volupton? (Tiu demando ne estas riproĉo, Dio min gardu!)*

*Do, permesita peko: Jozefo leĝe rajtas fiki Marian. Ĉu tion li faris, aŭ ĉu li "respektis" ŝin, laŭ la stranga senco de la franca verbo, kiu signifas: rezigni pri fiko al dezirata virino, eĉ se ŝi estas konsenta (Kaj banala spertado instruas, ke plej ofte komenca rifuzo estas nur preludo al fina konsento en reciproka deziro).*

*Ĉu do Maria edziniĝinta koitis kun Jozefo (aŭ kun iu alia, sed ticokaze ŝi estus adulta, do ne plu senpeka) - aŭ ĉu ŝi restis virga ĝis sia morto? Ni ne forgesu, ke koito restas peko: ĉu la Senpekulino povis koiti?)*

*Ja ie en la Evangelioj temas pri fratoj kaj fratinoj de Jesuo. Nu? Sed iuj teologoj argumentas, ke en la aramea idiomo la vorto frato estis aplikata ankaŭ al kuzoj (onklidoj kaj eĉ pli malproksimaj parencoj). Do?*

*Do tiu interesa demando restas senresponda. Ĝi povas esti senfine diskutata, kiel la bizancaj monakoj disputaĉis pri la sekso de la anĝeloj, dum la Turkoj sieĝis ilian ĉefurbon. Kaj per fina sturmatako konkludis la argumentadon. Kiel eble niajn subtilajn rezonadojn iam finsolvos iu natura aŭ artefarita kataklismo.*

*

*Kio distingas la teologion disde la scienco, tio estas, ke scienco esploras naturajn fenomenojn kaj provas ilin klarigi per rigora rezonado, kaj precipe kontroli per reprodukteblaj mezureblaj eksperimentoj. Dume teologio analizadas tekstojn inspiritajn aŭ diktitajn de dio, sed finfine skribitaj de homoj, do diverse interpreteblaj.*

*Ĉu do niaj sciencoj ne estas ankaŭ submetitaj al interpretado? Ĉu ili kondukas al nepraj certaĵoj? Ho ve!*

*Scienca teorio estas bazita sur hipotezo, kiu klarigas ĉiujn jam konitajn faktojn. Ĝis ĝi kolizias kun unu nova, kiun ĝi ne povas klarigi. Tiam necesas ĝin modifi kaj adapti, kaj iafoje per disŝira revizo ĝin tute detrui, forbalai la rubojn, kaj konstrui novan teorion surbaze de nova hipotezo. Tiu ĉi sufiĉos dum tempo, ĝis siavice... ktp. Scienco ja ne estas sumo da definitive akiritaj scioj, sed vico de sinsekvaj probabloj, progresantaj per iompostiomaj pliproksimigoj, oportunaj, sed neniam atingantaj finan veron. (Henri Poincaré,* ***La Science et l'Hypothèse****).*

*Blazio Paskalo, tiu grandega pensulo, kiu per inteligenta, sagaca, lerta laborado multe antaŭenigis la fizikajn sciencojn, prave diris: Koni, tio estas serĉi. Scienco estas senfina serĉado.*

*Sed Paskalo serĉis tiun absolutan veron, kaj, ne trovinte ĝin en scienco, li sin turnis al la dogmoj de la kristana religio, kiu ankaŭ ne povis ĝin doni al li.*

*Same Ejnstejn, la giganto de niaepoka scienco, serĉadis la formulon de unika universala leĝo, kiu klarigus ĉiujn fenomenojn**

----

* Ejnstejn, Di-kredanto diris: Mi ne povas akcepti la supozon, ke Dio ludas per ĵetkubetoj la sorton de la Universo.



*kaj mortis en tiu vana serĉado. Poste ankaŭ liaj disĉiploj neniam atingis la celon.*

*Nun multaj intelektuloj provas rekunigon de scienco kaj religio, kiel en la Mezepoko. Ĉu ili sukcesos tiun novan sintezon?*

*Iuj paralele kulturas "ekzaktajn" sciencojn kaj "okultajn" sciencojn, teknikon kaj esoterismon. Iuj konvertiĝas al antikvaj aŭ novaj religioj, sekvas profetojn, sektestrojn, guruojn.*

***Min koncerne, mi estas jam tro maljuna, tro sklerozita, tro mense rigidiĝinta por adaptiĝi al tia evoluo. Mi estas homo de la 19a jarcento pli ol de la 21a. Kaj neniam mi komprenos teologion.***

**Jakelino :**

**"Vi estas sub la influo de via medio",**
**aŭ la mito pri la dezerta insulo**

La helena maksimo "Vin konu mem" ampleksas la konsilon: "konu la influojn, kiuj igis vin tia, kia vi estas". Neniu homo naskiĝis sur dezerta insulo, sen ia ajn kontakto kun aliaj homoj. Ke bubo mamnutrita de lupino povus fariĝi la fondinto de brila civilizacio, estas nur legendo. En la realo, Victor de Aveyron estis kompatinda infano, kiu neniam atingis la intelektan nivelon de ordinara homo. Kaj eĉ en la mito, la Robinsono de Defoe alportas al sia insulo sian britan edukon, kaj havas kun Vendredo la rilaton de koloniisto al sklavo. (Mi preferas pri tiu temo la rakonton de Tournier).

Mi estas tia, kia igis min miaj rilatoj kun aliaj homoj. Mi bone konscias, ke mi povus esti budhista, aŭ ateista. Tiu scio instigas min al toleremo kaj al scivolemo pri la ideo de homoj, kiuj ne pensas kiel mi. Male de kelkaj francaj ateistoj, mi ne dividas la tutan homaron al du kategorioj: reakciaj kredantoj kaj progresemaj nekredantoj. La realo estas pli bunta, ol tiu maniĥea karikaturo.

Pli precize, mi konscias ke:

* Se mi naskiĝus 5 jarojn pli frue, mi verŝajne estus malkatolika, kaj kredus min liberpensa. Kun 8 jaroj mi iris al la katolika katekismo, kaj rajtis ĉion, kion oni instruis tie antaŭ Vatikano II-a: neerarpovo de la papo, mirakloj en Lurdo, kaj ĉefe, ĉefe, konstanta minaco pro la infero. Mi memoras, ke mi ne povis ekdormi vespere, ĉar mi timis, ke dum la nokto okazus la lasta juĝo, kaj ke mi estus kondamnita por la eterneco pro manĝado de sukero malantaŭ la dorso de mia patrino, aŭ simila "morta peko". Tial mi komprenas tiujn, kiuj ne sufiĉe liberiĝis de katolikismo por perdi eĉ la deziron bruligi

preĝejojn. Sed la trian jaron de katekismo mi ricevis en alia paroko, kie, anstataŭ plenigi mian infanan kapon per dogmoj, oni legigis al mi la evangeliojn. Tiu teksto forte influis, kaj plu influas min. Ne, mi ne obeas ĉiun apartan frazeton kiel blinda sklavo. Mia rilato al tiu teksto estas komparebla kun la rilato de eseisto Montaigne kun la helenaj kaj latinaj tekstoj: la teksto fariĝis por mi tiel intima, ke ĝi estas kvazaŭ ero de mia propra penso. Mi poste legis la Koranon kaj la Bagavadgiton, kaj ili ne donis al mi la saman emocion. Ĉu pro tio, ke ili ne estas tiom interesaj? Ĉu ne pli ĝuste pro tio, ke mi ne plu aĝis 10 jarojn, kiam mi ilin ekkonis?

* Se mi irus, ne al laikaj lernejoj, sed al privataj katolikaj lernejoj, mi tamen studus Kartezion kaj Volteron, ĉar la studprogramo estas la sama. Sed mi legus ilin en alia etoso. En liceo, kiu havas la formon de martelo kaj falĉileto, mi legis Kartezion nur por prepari la bakalaŭron, kaj li terure tedis min. Sed mi sufiĉe legis liajn verkojn por scii, ke grava piliero, sur kiu li bazis sian mondkoncepton, estis la ekzisto de Dio. Male, Volteron mi legis kun ĝuo, eĉ se mi pli bone komprenis, kion li kritikis, ol kion li konstrueme proponis. Mi sufiĉe legis liajn verkojn por scii, ke li malfavoris al ateistoj. Katolika edukado eble konvinkus min, ke Voltero estis la patrono de ateistoj. Kia miskompreno! Kaj, ĉefe, en laikaj lernejoj mi havis ĉiutagan kontakton kun gejunuloj, kiuj venis el aliaj medioj. Min forte impresis la malkovro, ke juda kamaradino kredas, ke antisemitismo estas normala elemento de kristanismo. En katolika lernejo mi ne lernus antisemitismon, sed mi ankaŭ ne lernus vidi la historion de la katolika eklezio per la okuloj de juda knabino.

* Se mi ne forlasus la parizan regionon aĝante 17 jarojn, mi verŝajne estus nun sennaciisto. Kiel pariza knabino, mi kiel ĉiuj parizanoj konfuzis la vortojn "nacio" kaj "ŝtato". Mi deziris, kaj plu deziras, ke paco regu inter homoj. Do kun 17 jaroj mi estis tia, ke certe sennaciismo konvinkus min, se mi restus parizano. Sed kun 17 jaroj mi retrovis min en Clermont-Ferrand t.e. urbo sen propra personeco, kiu povus esti ia ajn urbo de Okcidenta Eŭropo. Teruraj estas klermontaj aŭgustoj: forprenu de la urbo la laboristojn de Michelin kaj la studentojn, kaj restas plu nenio. En Clermont mi observis kantalanojn kaj lozerianojn, kiuj parolis okcitane inter si. Tio instigis min interesiĝi pri la okcitana kulturo. Tamen, kiam etnistoj diris al mi, ke mi nomu min okcitana, mi respondis: "se mi dirus al viro, ke ĉar li simpatias al feminismo li devus nomi sin virino, li respondus, ke tio estas absurdaĵo. Mi estas franca, kaj ne povas ŝanĝi tiun fakton." En Clermont mi konsciis pri mia propra etna aparteno, kaj pro tiu kono akiris respekton al aliaj etnoj.



* Se mi alvenus en universitato 10 jarojn pli frue, aŭ 10 jarojn poste, mi verŝajne ne havus la politikajn ideojn, kaj agadojn, kiujn mi nun havas. Sed mi alvenis en novembro 1968a. Mi vivis dum 7 jaroj en etoso de libera diskutado, kie oni bonvenigis novajn ideojn. En tiu etoso mi transiris de iom romantika kristana idealismo al manifestacioj kontraŭ armilkomerco. Jes, mi volis ŝanĝi la mondon. Tio estis kutima deziro en mia generacio. Sed ĉu nur en mia generacio? Ĉu tio ne estas natura pensmaniero de junaj homoj? Miaj malplej junaj nevinoj luktas kontraŭ rasismo.

* Se mi alvenus en alia universitato, ol en tiu de Clermont-Ferrand, mi verŝajne ne lernus Esperanton. Esperanto multe influis, kaj plu influas, mian pensmanieron. Mi ĵus aliĝis al la homaranisma asocio, kiu provas studi la aktualecon de la ideoj de Zamenhof.

Kaj, dank'al Esperanto, mi fariĝis membro de SAT. Mi aliĝis al SAT en Clermont, t.e. en tiu etoso de libera diskutado, en kiu mi vivis dum mia studenta epoko, kaj forlasis ĝin, kiam oni rifuzis al mi la rajton libere diskuti pri ĉio kun miaj gekamaradoj. Se tiu situacio ŝanĝiĝos, mi re-aliĝos. SAT ne iluminis min, sed ĝi multe alportis al mia mensa evoluo. Dank'al SAT-anoj mi konis verkojn de Han Rîner kaj de Kropotkin, kiuj komprenigis al mi, ke liberpenso estas multe pli valora pensmaniero, ol mi povus kredi legante la gazeton, kiun abonas mia malkatolika frato Roger, kiu naskiĝis 5 jarojn antaŭ mi. Dank'al SAT mi konis la anarkistan pensmanieron, kaj mi kredis ĝin mia, ĝis kelkaj kamaradoj montris al mi, ke mi ne havas lokon inter ili. Malgraŭ tiuj, mi tamen plu emas al liberecana mondkoncepto. Dank'al SAT mi konis homojn, kiujn mi nun nomas amikoj.

Kiel ĉiu individuo, mi estis influata de la homoj, kiujn mi renkontis, ĉu rekte, ĉu per iliaj verkoj. Ne, mi ne venas de dezerta insulo, mi vivas en preciza loko en preciza epoko. Ĉu tio signifas, ke mi ne estas libera homo? Male, mi kredas, ke ĝuste tiu, kiu konscias pri si mem, povas esti libera. Mi ne kredas, ke se mi naskiĝus antaŭ 3000 jaroj mi tamen estus kristana, nek ke, se mi naskiĝus antaŭ 150 jaroj mi tamen estus esperantista. Mi ne senĉese parolas pri libroj, kiujn mi ne legis. Nun mi estas simpatianto de eklezio, kiun mi libervole elektis konstatinte, ke ĝi ne kredas sin posedanto de la

vero. Nun mi vivas en urbo, kiun mi elektis, ĉar ĝi havas propran personecon. Strasburgo, Strossburi, urbo, kiun oni povas konfuzi kun neniu alia, kie Rossbif estas ĉevalaĵo kun saŭco kaj malvarmaj terpomoj; urbo, kie matene, ankoraŭ ne tute malmergiĝinta el la dorma nebulo, mi riskas, ke oni surstrate demandu min: "well ühr isch, wenn's beliebt?". Strasburgo, Strateburgum, Strassburg, urbo, kiu de 2000 jaroj estas "la urbo sur la vojo", renkontejo de diversaj kulturoj, urbo, kie estas normale renkonti judojn kun barboj, vangharoj kaj nigraj ĉapeloj; urbo geografie tiom proksima al Rijeka, kiom al Bulonjo-ĉe-maro. Mia profesia laboro ne multe interesas min (ne kaj ne : bibliotekistoj ne estas salajrataj por legi librojn!), sed ĝi lasas al mi sufiĉe da libertempo por diversaj aktivadoj, kiujn mi mem elektas. Do ĉu mi estas determinita? Mi opinias, ke mi tia estas. Ĉu mi estas libera? Mi opinias, ke mi tia estas.

Ĉu fuĝi el la kolektivo por serĉi memsufiĉon? Nu, homoj, kiuj plej praktikas memsufiĉon, estas trapistoj: ili ja kuniĝas por preĝi, sed la plej grandan parton de siaj tagoj ili trapasas solaj en ĉeloj. Iliaj kontaktoj kun la ekstera mondo estas minimumaj, kaj eĉ interne de la monaĥejo ili ne parolas unu al la alia. Ili ne ambicias ŝanĝi la mondon (aŭ ĉu ili kredas, ke tion ili faras per sia preĝado?), sed ŝanĝi sin mem en la soleco. Mi ne scias, ĉu Garolo estus bona trapisto, sed ne havas mi animon de karmelanino : mian dion mi renkontas nur per la renkonto de aliaj homoj. Mi estus malfeliĉega sur dezerta insulo, eĉ se mi tie disponus pri biblio. La homoj, kiujn mi renkontis, igis min tia, kia mi estas. Estas logike kredi, ke ankaŭ mi ilin influis. Kelkaj diris tion al mi. Per tiu interŝanĝo kun aliaj homoj ni riĉigas nian personecon kaj edukas nin mem.

Ĉu mi plibonigis la mondon? Iam mi kredis, ke mi scias, kiel oni faras por tion atingi. Mi perdis tiun iluzion. Mia korespondado kun Ludoviko alportis al li iom da espero en lia malliberejo, li skribis en unu el siaj poemoj, ke eble la homaro ne estas tiom senvalora, kiom li antaŭe kredis. La Franca Respubliko plu enkarcerigas soldatrifuzantojn, sed malpli longe, ol ĝi faris antaŭ kelkaj jaroj. Ĉu pro la aktivado de miaj gekamaradoj kaj mi? Eble. Imdad Hussain Chandio liberiĝis antaŭ la fino de sia puno. Ĉu pro miaj protestoj kaj tiuj de miaj gekamaradoj? Mi ne scias, mi nur ĝojas pro li. Tio estas nur gutoj en oceano. Ĉu oceano estas pli ol la gutoj, kiuj ĝin konstituas? Mi ne scias.

----- Ndlr.:
Tiu ĉi artikolo estis ricevita en la kadro de la debato "La krizo: kiu elirejo?"



# SIFILISO KAJ S.I.D.A.

(daŭrigo de p. 50)

popolo kaj, en ne rekta maniero, al la tuta homaro.

For, for la armiloj! En la milito troviĝas la radiko de preskaŭ ĉiuj malbonaĵoj, kiujn suferis kaj suferas la homaro.

Tio legita estas mia artikoleto, sed ĉi tiu aldono estas, por ke meditu tiuj, kiuj kredas, ke sur nia mondo agas fortoj eksterhomaj.

Sifiliso aperis kelkajn jarojn post la malkovro de Ameriko; **sida**, kelkajn jarojn post la alveno de la unua homo al la luno, "malkovro" de la luno, jaro 1969-a.


Efikan kuracilon por la sifiliso (penicilino) oni eltrovis 400 jarojn post ĝia apero, kaj ni esperu, ke ni ne devu atendi aliajn 400 jarojn por eltrovi efikan kuracilon kontraŭ sidao.

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

**A. Lopez Luna**

************************************************************************

# KRUCVORTENIGMO



**Horizontale**

**1.** - Tia, ke li (aŭ ŝi) jam ne plu estas dum la infanaĝo. **2.** - Mallongigas la sekvaĵon. - Ĝi ne portas la fulmon en sia sino (s.f.). **3.** - Ĝi igas monotona la aviadilan vojaĝon (s.f.). - Simbolo de malofta gaso. **4.** - Vivrimedoj (s.f.). - Inflamo de skeleta histo. **5.** - Senpripensa parolanto. - Ajnan personon. **6.** - Persona pronomo. - Ŝnurligi kortobirdon antaŭ la kuiro. **7.** - Malfavora por rasmiksado. **8.** - Posedpronomo malordigita. - Nomo de litero, uzata interalie, kiel nomindiko de hokoj. - Sufikso. **9.** - Rilata al malofta metalo, kies atomnumero estas 39. - Specialaĵa. **10.** - Mallongigo de ĝentileca titolo. - Ĵuvelaĵoj. **11.** Oni uzas ilin en la modernaj sekcioj de reanimado por videbligi sur ekrano la koran ritmon de la paciento.

**Vertikale** **1.** - Emo de regno al plivastiĝo de sia influo (s.f.). **2.** - Vatikana ĉefkancelariano. - **3.** - Ribonukleata acido. - Oblikvan tranĉon de juntotaj latoj. **4.** - Idnaska. - Flaveca tero (s.f.). **5.** - Ĝia kapo estas ĝenerale lumĵeta. - Franca insulo apud Finistero (s.f.). **6.** - Ĝi malpleniĝas kiam oni ekpafas. - Nedifina pronomo. **7.** Prezentanta epidermajn ŝvelaĵojn, kiuj entenas puson. - Glavo (s.f.). **8.** - Konjunkcio uzata post komparativo. - Ĝi estas ĉiam majuskla en Venezuelo, sed ne en Kolombio. - **9.** - Inter la du pesiltasoj (s.f.). - Ĉinaj arboj kun ventumilformaj folioj. **10.** - Malsaneca malkresko de organo. - Adverba partikulo

(s.f. = sen finaĵo)

**Sfinksido**

**Nia novelo :** ANTONIO BELTRAMELLI (1879-1930)

# LA TRI MIRINDAJ DONACOJ

(el la itala: Daniel LUEZ)

Estis iam magiisto, kiu havis tri filojn. Kiam li mortis, li lasis al ĉiu el ili po unu donaco: al la unua li lasis fluteton, al la dua monujon, al la tria mantelon. Povraj donacoj, diros iu! Male, tiu fluteto, tiu monujo kaj tiu mantelo estis mirindaj: kiam iu ludis la fluteton, ĉiuj homoj grupiĝis, ensorĉitaj; kiam oni prenis monerojn el la monujo, tiu ĉi repleniĝis mem, kaj tiel ĝi estis ĉiam plena (kia interesa afero, ĉu ne?); kaj kiam iu surmetis la mantelon, li fariĝis nevidebla.

Post la morto de sia patro la plej aĝa el la tri fratoj iras al la proksima urbo. Alveninte sur la placo antaŭ la reĝa palaco, li haltas kaj ludas sian mirindan fluteton. La homoj grupiĝas, mirigitaj. La filino de la reĝo, kiu estis kaprica knabino, kiel tiom da knabinoj, kiuj ne estas filinoj de reĝo, iras al la fenestro kaj komencas krii, ke ŝi volas la sorĉan fluteton. Tiom ŝi faras kaj diras, ke la reĝo vokigas la flutiston kaj envenigas lin en la palacon. Nia naivulo jam kredis sin - kion mi scias? - ĉefministro aŭ edzo de la princino! Sed tiu ĉi, male, pruntoprenas la fluteton, ludas ĝin, kaj ne volas redoni ĝin. La filo de la magiisto, forpelita de la gvardianoj de l' palaco, revenas hejmen kun manoj malplenaj kaj plena de tristeco.

La dua frato foriras siavice el la domo kaj iras al la bazaro, kiu okazis sur la placo antaŭ la reĝa palaco. Li havis enmane la magian monujon: li aĉetas kaj aĉetas, la monujo estas ĉiam plena. La homoj vidas la mirindaĵon, kaj la novaĵo disvastiĝas tra la tuta bazaro, trapasas la pordon de la palaco, kaj fine alvenas al la oreloj de la princino, kiu komencas krii, ke ŝi volas la magian monujon. Tiom ŝi faras kaj diras, ke la reĝo vokigas la junulon. La princino diras, ke ŝi volas nur vidi, kiel estas farita tiu monujo.

La trofidema junulo donas al ŝi la monujon kaj la princino ne volas redoni ĝin.

Forpelite, ankaŭ li, de la gvardianoj de la palaco, la dua frato revenas hejmen kun manoj malplenaj kaj plena de tristeco.

La tria frato foriras siavice al la urbo de la reĝo, kaj sur la placo antaŭ la reĝa palaco, li surmetas la mantelon, kiu igas nevidebla tiun, kiu ĝin surhavas. La novaĵo pri la mirindaĵo disvastiĝas, trapasas la pordon de la palaco kaj alvenas al la oreloj de la kaprica princino, kiu vokigas la junulon kaj prenas la mantelon, kiel ŝi estis preninta la fluteton kaj



la monujon.

Sed tiu frato ne revenas hejmen kaj li komencas trakuri la mondon, serĉante kiel li povus venĝi sin kontraŭ la princino kaj repreni la mantelon, la monujon kaj la fluteton.

Iun tagon, en arbaro, li vidis belan figarbon ŝarĝitan per maturaj fruktoj. Li malsatis kaj manĝis el tiuj figoj; sed jen lia nazo komencas kreski, kaj ju pli li manĝis, des pli lia nazo kreskis. Li foriras tiel, kun la nazo longa kiel tiu de Pinokjo, kiam li mensogas.

Li paŝas, paŝas, paŝas, tiu bosko estis arbarego kaj neniam finiĝis. Denove li malsatas. Fine li vidas alian figarbon ankaŭ ŝarĝitan per fruktoj. Li manĝas el tiuj figoj kaj lia nazo retrovas iom post iom siajn normalajn dimensiojn. Nun la junulo prenas korbon da tiuj figoj, sekigas ilin kaj faras pulvoron el ili. Poste li revenas al la unua figarbo kaj prenas unu korboplenon de la figoj, kiuj kreskigis la nazon. Li denove survojiĝas kaj revenas al sia lando. Alveninte sur la placo antaŭ la reĝa palaco, li haltas kaj komencas krii: "Kiu volas miajn figojn? Kiu volas la plej dolĉajn figojn en la mondo?"

La princino aŭdas la krion, aperas ĉe la fenestro, volas manĝi la plej dolĉajn figojn en la mondo, vokigas tiun novan komerciston. Kiam ŝi vidas la korbon sur la tablo, la princino diras, ke ŝi volas ĉiujn figojn kaj forpeligas nian komerciston de la gvardianoj de la palaco.

Sed kiam ŝi manĝis la figojn, jen ŝia nazo kreskas kaj fariĝas longa, longa kiel la tenilo de balailo. Ŝi rigardas sin en la spegulo, krias pro teruro, ploras kaj diras, ke ŝi ne volas vidi sin tiel malbela.

Pro la bruego, kiun ŝi faras, la reĝo, la reĝino kaj ĉiuj sinjorinoj de la kortego alkuris kaj ne rekonis la princinon, tiel malbela ŝi estis.

- Sed kiu estas tiu ploranta knabino?
- Kiel ŝi venis tien ĉi? Ĉu vi ne scias, ke tiuj ĉambroj estas tiuj de la princino?

Nun la princino komencis krii kaj pli laŭte plori; la reĝo rekonas ŝin kaj ankaŭ li ploras:

- Ho, povra filinjo! Sed kion vi faris? Kiel do vi fariĝis tia?

Ankaŭ la reĝino kaj la sinjorinoj de la kortego ploris.

La reĝo, forviŝante siajn larmojn per la poŝtuko, ordonas voki senprokraste la plej famajn kuracistojn en la reĝlando, inter kiuj Profesoro Ventrotranĉul', la plej famekonata kirurgo en tiu tempo, ĉar li estis apertiginta la moŝtajn ventrojn de la plimulto de l' ministroj de l' reĝolando. La profesoro, bone palpinte la monstran nazon de la princino, diris, kompreneble,

*ke necesas tranĉi tiun ĉi nazon. Kaj li komencas pretigi la instrumentojn de sia arto, kontenta kiel reĝo, ĉar li povis realigi operacion tiel originalan kaj eksterordinaran. Sed ju pli li tranĉis, des pli kreskis la nazo, tute same kiel la nazo de Pinokjo. Fine li estis devigata forlasi tiun impertinentan nazon, kiu aŭdacis kontraŭdiri la plej faman profesoron en la tuta reĝlando.*

*La reĝo, la reĝino kaj la tuta korteganaro ploris tage kaj nokte. Ĉiuj estis senkonsolaj.*

*Nun nia junulo, nigre vestita kiel kuracisto, prezentiĝis en la reĝa palaco:*

*- Via reĝa moŝto, se vi lasos al mi unumonatan tempon, mi igos la nazon de la princino refariĝi tia, kia ĝi estis antaŭe, sed vi devos doni al mi tion, kion mi petos de vi.*

*La reĝo promesas kaj la kuracado komenciĝas.*

*La pulvoro de figoj produktas la deziratan efikon kaj, post unu monato, la princino refariĝas tia, kia ŝi estis antaŭe. La nova kuracisto ankoraŭ ne diris kiun rekompencon li deziris, kaj la reĝo komencis pensadi. Iun tagon, kiam la princino gvidis lin tra ĉiuj ĉambregoj de l' palaco, ili alvenis al tiu, kie troviĝis la fluteto, la monujo kaj la mantelo. La junulo rekonas ĉi tiun kaj diras:*

*- Kiel rekompenco pro la mirinda kuracado, kiu resanigis vin, princino, permesu al mi provi tiun ĉi mantelon.*

*- Vi povas provi ĝin, se vi volas, respondas la princino, kaj en si mem ŝi pensis: "Ne tre gravas, se tiu kuracisto kontentiĝas provante mantelon!"*

*Sed la junulo surmetas la mantelon, prenas la fluteton, la monujon kaj diras:*

*- Tiel vi ne vidas min kaj ne plu vidos min! Bonan nokton, princino!*

*Kaj la tria frato malaperas, lasante la princinon kun malfermita buŝo.*

*Reveninte hejmen, li redonas la fluteton al la plejaĝa frato, la monujon al la dua kaj konservas por si la mantelon, kiu igis nevidebla.*

*Tiel retrovinte la mirindajn donacojn postlasitajn de la patro, la tri fratoj vivis riĉaj kaj kontentaj.*

*FINO*



# laŭtaj informoj kaj petoj

## MONDHEJMO
### Ekologio - Esperanto

Kio okazis en Koduro pasintan someron?

Komence de aŭgusto, dum 10-15 tagoj, retroviĝis en Koduro, inter 20 kaj 30 homoj (inkluzive infanojn), kiuj ĝuis la belegan sovaĝan naturon ĉirkaŭan, la amikan kunvivon, kaj laboris kun entuziasmo, sindonemo kaj kompetento; jam la malfortaj neuzeblaj muroj estas diserigitaj. Laŭ la proponoj kaj la deziroj ni kune ankaŭ spertis masaĝojn, jogon, meditadon, kantojn, ludojn, kaj gustumis diversajn tizanojn faritajn el la riĉaj multnombraj lokaj plantoj. La rekonstrua laboro ankoraŭ ne komenciĝis kaj progresos nur malrapide, sed tra la fortaj amikaj ligiloj kiuj kreiĝis inter la partumantoj dum tiu harmonia kaj frateca somera renkontiĝo, MONDHEJMO jam nun vere ekzistas (... eĉ sen muroj).

Kio okazos venontan someron?

Dum la tuta julio ni intencas renkontiĝi en Koduro, daŭrigi la laboron kaj laŭ la deziroj kaj bezonoj instrui kaj praktiki nian verdulan lingvon. Ni antaŭĝojas konatiĝi kun tiuj el vi, kiuj povos veni: rustika senkomforta domo estas disponebla por 20 homoj (po ĝis nun, 15 FF, nokte sen manĝaĵo). Eblas ankaŭ tendumi. Bonvolu nur anonci vian alvenon (menciante la precizan periodon) al:

Catherine Samain, 9 av. de Verdun, F 60200 COMPIEGNE aŭ
al Nicole Pairoux, rue Saint-Luc 35, B-5004 NAMUR

Tiuj, kiuj kompetentas pri masonista, elektrista, lignaĵista kaj tubista laboroj estus aparte utilaj, sed kompreneble ĉiuj bonvolemuloj estos bonvenaj. Krome ni antaŭdankas ĉiujn, kiuj povos finance apogi kaj subteni la projekton - eĉ malgrandskale - ĉu per pruntedono, ĉu per donaco.

# KIU HELPOS MALJUNULON?

Nia kamarado Gastono estas 70-jara kaj ne plu havas familianojn. Li estas preta transdoni siajn esperantaĵojn kaj aliajn dokumentojn al junulo aŭ junulino, kies familio akceptus zorgi pri li. Krome li proponas monon por aĉeti, renovigi aŭ pligrandigi la domon, sed la ĉefa kondiĉo estas, ke tiu domo troviĝu en la 5-a zono de la Parizaj transportoj, prefere suda parto, kie li ofte vojaĝas. Necesas ankaŭ, ke la ebla heredont(in)o kapablu kompreni Esperanton aŭ tuj eklernu ĝin, ĉar liaj notoj estas plej ofte en Esperanto kaj li intencas lasi verkaron indan esti eldonota. Li esperas kompletigi multajn tekstojn antaŭ la fino de sia vivo. Jen sekvas kelkaj klarigoj de li pri li mem.

Eble vi opinias, ke pli bone estus min direkti al speciala domo por maljunuloj, sed tie mi ne rajtus kunporti mian abundan dokumentaron, aŭ mi devus transdoni la tuton al bibliotekisto - se ĝi ekzistas - kaj mi spertis la laboron de la "ĉiopotencaj" bibliotekistoj, kiuj, pro manko de spaco vendas, donacas aŭ detruas ĉion, kio ŝajnas al ili ne sufiĉe interesa por la ejo, (aŭ tute simple ne plaĉas al ili!). Do, post du aŭ tri malsamaj bibliotekistoj, mi ne plu retrovus mian materialon!

Aliflanke, mi kutimas apartigi mian restantan aktivecon inter manlaboro, intelekta laboro kaj ripozo. (Sed dum ripozo, mia cerbo daŭre laboras. Ofte ĝi vekas min kiam ĝi ĵus trovis solvon pri grava problemo. Ne estas tre agrable, ĉar se mi ne tuj notas la respondon, mi ne plu povas dormi, aŭ matene, mi ne plu sufiĉe bone memoras!)

Mi posedas etan loĝejon proksime de la valorborso, taŭgan por studento, sed nuntempe oni provas renovigi la domon. Provizore mi loĝas ĉe la adreso de miaj gepatroj, kie mi rajtas momente resti kvankam la posedanto intencas malplenigi la domon.

Alia ebleco estus starigi asocion por eldoni miajn tekstojn, post mia malapero, kaj daŭre eldoni sekve de miaj ideoj per simpla, populara Esperanto (tio ne signifas, ke mi estas kontraŭ literaturo) pri la plej necesaj aferoj de la vivo, ekde baza, komuna etiko por ĉiuj al praktika konscio pri ekologio kaj mondunuiĝo, sen esti ligite per iu ajn sektismo.

Sed... mi ofte kritikis la tro multajn asociojn, kiujn oni devas registri, ktp.. Fine la afero estas la sama: plejofte tiaj asocioj funkcias kiam parenco aŭ amiko dediĉas sian vivon por ĝi; ĝi malaperas kun tiu homo!

Eble mirigas vin, ke mi ne ankoraŭ trovis taŭgajn amikojn por mia celo. Unue ili ne estas kie mi bezonas, aŭ ili ne povas pro familiaj kaŭzoj; due mi estas homo kiu diras ofte veraĵojn, eĉ kiam ili ne plaĉas kaj la plej nepardonebla afero estas ke mi malofte eraras!

Se eble vi deziras kontakti min, nepre akordiĝu unue perletere, ĉar mi ofte estas for kaj la ĉestrata pordo estas ŝlosita ĉefe vespere, sabate kaj dimanĉe. Ne ekzistas voksistemo.

**GASTONO**, 7.12.87

Gaston FOURNIER, 37 rue de Palestro, 75002 PARIS



# PLU HAVEBLAS ĈE U.E.A.-LIBROSERVO jenaj verkoj eldonitaj en ARGENTINIO



**Kalejdoskopa Varieteo** (E. de Bonaero). Kolekto de mallongaj eseoj, recenzoj, poemoj, bonhumoraĵoj. Originalaj kaj tradukitaj el diversaj landoj.

**Niaj plej grandaj verkistoj** (E. de Bonaero).

**Ekflorado ĉe Plata-Rivero.** La unua verko estas literatura gvidilo kun ekzemploj, celanta ĉefe la izolitan esperantiston; la dua priskribas la agadon de diversaj argentinaj kaj urugvajaj esperantistoj, denove kun literaturaj ekzemploj.

**Junulejo** (M. Cané); **La buĉejo** (E. Echeverria). Tradukis Ergoto de Bonaero. Argentinaj romano kaj novelo.

**La Krimo de l'Milito** (Juan Bautista Alberdi). El la hispana tradukis E. de Bonaero. Argentina verko pri politikaj, historiaj, juraj kaj filozofiaj aspektoj de milito.

## 11a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri esperanto de la 20a ĝis la 28a de aŭgusto 1988. Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en montara ripoza loko, kadre de agrabla familia domo, proksime de Svislando (30 km sud-oriente de Ĝenevo). Ĉi tiun jaron la restado estos aparte interesa ĉar ni kalkulas pri multe da alilandanaj partoprenantoj por krei vere internacian etoson.

Vi trovos plurajn nivelojn de E-aj kursoj kaj, ankaŭ... piediradon en la montaro, ekskursojn, belajn vesperkunvenojn kaj... bonan manĝaĵon. Restadokosto kun tri manĝoj: 111 FF tage. Ebleco tendumi proksime. Aliĝo/Informo: ESPERANTO, 5 rue du Dr Roux, F 34000 Montpellier

La 12an kaj 13an de Februaro 1988 okazos en Toulouse, la plej granda Festo de la junularo en Francio. Temas pri la Universitata Karnavalo.

Sekve de la peto de la Organizkomitato ĉi-jare parto de la karnavala kanto estos kantata kaj registrita sur disko kaj "video-clip" **en esperanto**. Miloj da partoprenantoj kaj rigardantoj aŭdos la internacian lingvon.

Tiaokaze la tuluzaj E-grupoj (neŭtrala kaj SAT-Amikara) antaŭvidas organizi renkontiĝon inter la tuluzaj kaj eksterurbaj esperantistoj, antaŭ la paradan iron de la sabato 13a de Februaro. Sciigu pri tiu okazaĵo viajn konatojn!

Se vi intencas ĉeesti la Feston, telefonu al : MEMBRADO, Tel.n-ro 61.44.24.03. Ni donos al vi la lastajn informojn kaj helpos vin, eventuale, koncerne la hotelojn, ktp.

**Anonceto:** De longe mi planas vojaĝi al Eŭropo kaj ankaŭ viziti miajn geamikojn en diversaj landoj. Mia unua plano estas vojaĝi bicikle kaj piede kaj baldaŭ mi komencos. Mi diplomiĝos en Historio junie 88 kaj tiam mi intencas entrepreni, eble kun mia frato Adriano (ankaù SAT-ano) la vojaĝon, unue al Portugalio, Hispanio kaj eniri en Francion, kie mi deziras pliboniĝi miajn sciojn en Internacia Lingvo kaj labori ĉe esperantistoj. Mia adreso: Aleksandro CARNEIRO, strato Sao Vicente de Paulo, S/N, Santa Barbara, Bahia, Brazilo, 44150.

*****************************************************

## BILANCO de "Laŭte!" por 1987

**Abonantaro** : 396 abonoj (-12). La regreseton kaùzis ĉefe iom malpli da donacitaj abonoj kaj iom malpli da legantoj en Francio(243 anstataù 254). Aliloke la abonantaro restas stabila aù eĉ progresetas (Aùstralio, Belgio...)
38% el la abonantaro loĝas ekster Francio (37% pasintjare).

**La jarkolekto** konsistis el 322 paĝoj (4 "duoblaj" numeroj + 1 ordinara). En la kontribuantaro troviĝis 76 malsamaj personoj (72 en 1986).

**Bilanco** : La sendado de unu malplia n-ro (nur 26 malpliaj paĝoj) ebligis repozitivigi la bilancon. Por 1988 ni povas plani la aperigon de 5 duoblaj numeroj (se necesigos tion la ricevota materialo) kontraù jarabono fiksita je 35 FF.

| | | | |
|---|---|---|---|
| **La kaso :** | | Eldonkostoj: | 7614,40 |
| Abonoj kaj donacoj : | 11757,45 | Afrankokostoj: | 2685,51 |

Jara saldo : 11757,45 - 10299,91 = + 1457,54
Antaùa saldo (fine de 1986): 7035,02. Nova saldo: 8492,56 FF en la poŝtkonto.

## BILANCO DE SAT-BROŜURSERVO por 1987

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vendoj - Provizoj : | 41283,46 | Eldonkostoj: | 23006,80 |
| Donacoj : | 1270,00 | Afrankokostoj: | 2414,50 |
| Diversaĵoj : | 1566,80 | Diversaĵoj (transĝiroj): | 10531,46 |
| Enspezoj: | 45120,26 | Elspezoj: | 35952,76 |

Jara saldo : + 9167,50
Antaùa saldo (fine de '86): 18886,33. Nun en la kaso: 28053,83 FF

La nun enkasa "kapitalo" konsistas grandparte el mono antaùprovizita de broŝurabonantoj, kaj kiu ebligos daùrigi senprobleme la plueldonadon de la broŝura serio. Sed multe pli grava kapitalo konsistas el granda stoko da malnovaj disvendotaj broŝuroj.

La pasintjara aĉeto de "Aùgusto" (la ofsetilo) necesigis alvokon por helpo per donacoj. La donacoj registritaj ĝis L! 70 atingis 3621 FF. Poste alvenis donacoj de amikoj P.B. (20.) kaj P.D. (50.). Sume tiel estis kolektitaj 3691 FF, ja ne sufiĉe por pagi ĉiom, sed, ĉar la kasprofito ebligis ŝtopi la truon, mi poste ne plu petis tiucelan helpon. Dankon al ĉiuj donacintoj!

Kribo



# Mortis D-ro István Szerdahelyi

Bedaùrinde en la 21-a de aùg. 1987. mortis la katedestro de la esperanta fako de la budapeŝta sciencuniversitato Eötvös Loránd: D-ro István Szerdahelyi.

En la tombejo post la eklezia ceremonio la prelegantino de la esperanta fako Dr. Zsuzsa Varga-Haszonits adiaùis la mortinton, kiun ĉiuj disĉiploj, kolegoj, konatoj kaj esperantistoj honoris. Ŝi tiel parolis: "La gvidantaro, instruantaro kaj laborantaro de la Filologia Fakultato de la Sciencuniversitato Eötvös Loránd, la kunlaboristoj de la Ĝenerala kaj Aplikata Fakultato de la Universitato, la kolegoj kaj la disĉiploj jam pretiĝis al la nova lernojaro, al la novaj taskoj, kiam kun granda ĉagreno ili eksciis la rapidan morton de Dr. István Szerdahelyi, la gvidanto de la E-fako de la katedro.

Ni sciis pri lia grava malsano, ni ĉiuj, kiuj havis ĉiun tagon laboran kaj amikan kontakton kun li; sed konante lian vivforton, aktivecon, kaj grandegan energion, dediĉitan al la afero de la internacia lingvo, nekredeble malfacile estas akcepti, ke lia vivoĝojo devis finiĝi tiel frue, en lia 63-a jaro. En lia persono ni honoris la grandscian, vastan horizonton havantan instruiston, la denaskan, eminentan profesoron, la veran, homecan homon. Per sia entuziasma instrua, esplora kaj aùtora laboro li donis ekzemplon, kiamaniere eblas neglekti la malvastajn, ŝovinistajn kaj nacionalistajn antaùjuĝojn, serĉante la pli bonan konsenton inter la popoloj kaj nacioj, realigante la belegan ideon de la vera internacieco, ne per malplenaj sloganoj sed per serioza, memkonscia kaj rezultplena, scienca instrua kaj eduka laboro.

En ĉiuj tiuj aferoj István Szerdahelyi pruviĝis esti vera ekzemplo. La sorto ankaù lin, kiel Zamenhofon, preskaù helpis serĉi la vojon de la kompreno, inter la multlingvanoj. Naskiĝinte en Transilvanio (Erdély), li finis siajn mezlernejajn studojn en gimnazioj, instruinte en rumana, franca kaj hungara lingvoj. Ĉirkaù li oni parolis en pluraj lingvoj, kaj li mem akiris la bazelementojn de sia scio en pluraj lingvoj. Tio ne rezultigis malavantaĝojn, eĉ pli avantaĝojn. Jam en la gimnaziaj jaroj li ekposedis tiujn lingvajn elementojn, el kiuj Zamenhof kreis Esperanton.

En la septembro de 1949 fine li dediĉis sin al la profesio de la instruado kaj edukado, kiam li akceptis la instruadon de la rusa lingvo en iu bazlernejo. Li multe okupiĝis pri la metodikaj demandoj de ĉi tiu mondlingvo. Jam tiam evidentiĝis lia grandega pedagogia-metodika laboro. Paralele kun la rusa lingvo, entuziasmiĝinte por la ideo de la internacia lingvo - kaj samtempe gvidate per lingvistika interesiĝo, li perfekte ellernis ankaù Esperanton, kaj ĉie, kie nur eblis, li instruis ĝin ĝis, en 1966, per la efika apogo de profesoro de la lingvistiko, Céza Bérczi, en la katedro komenciĝeblis la instruado de la esperantaj lingvo kaj literaturo. Tiam li ricevis la taskon gvidi ĉi tiun fakon, tiam tute novan en tuta Eùropo, kaj plenumi ĝiajn ĉiujn lecionojn, kiel ekstera lekciisto. Dum kvin jaroj, ĝis li ricevis sian konstantan laboron, li sole organizis la laboron de ĉi tiu fako, li elformis ĝian instruadan kaj ekzamenan sistemon.

Ĉi tiu tasko estis tre malfacila, ĉar István Szerdahelyi povis apogi sin nur al sia propra forto en la plenumado de ĉi tiu sizifa laboro.

Li devis ekstarti de tio, ke lia tasko ne limiĝis al la instruado de ĉi tiu lingvo. Ĉi tiu fako bezonis ne nur lertan kaj praktikon havantan lingvoinstruiston, sed ankaŭ sciencistón, lingvoteorie kulturitan, kreantan, fantaziplenan karakteron. Unu el la sekretoj de lia rezultoplena agado estis la saĝa ekkono de tio, ke la esperanta fako povas havi lokon en la Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistika Katedro de nia Fakultato, se ĉi tiu formulo plu kreskigas la malvastajn kadrojn de la tro esperanto-kerna praktikismo, kaj ĉiam pli forte integriĝas al la ĉi tie vivanta instrua kaj esplora laboro; se grade ĝi formiĝas al interlingvistika, samtempe forte aplikata lingvistika fako. Ĉar Esperanto povas fariĝi samranga honorata universitata studobjekto - ĝia studado, esplorado lingvistika forma - nur tiel.

La instruado kaj kun ĝi la skribado de la lernolibro, estis nur unu flanko de lia multflanka laboro. Dume li ĉiam esploris la interlingvistikajn koncernojn de sia fako. Unu el la plej gravaj pruvoj de ĉi tiuj direktaj liaj sciencaj esploroj estis lia baza monografio, eldonita en 1977 kun la titolo "De Babelo ĝis la mondlingvo". Ĉi tiu estis la unua ĉiuvidpunkte internacinivele staranta verko en nia lingvo, kiu vicigas la heroajn strebadojn por la ĉesigado de la multlingveco, signifante ofte malbenon al la homaro.

Rigardinte la tre grandan liston de liaj aliaj publikigaĵoj, antaŭ ĉio videblas la multflankeco kaj vasteco de lia interesiĝo. La grandnombra publikaĵo kaj skribaĵo pri la ĝenerala metodiko de fremdaj lingvoj, kaj en ĝi la riĉa sperto pri la instruado de Esperanto. Longa estas la listo de liaj lernolibroj kaj helpiloj, helpantaj la instruadon de la rusa kaj de la esperanta lingvoj. Sed almenaŭ same gravaj estas liaj artikoloj, prelegoj, studoj pri variaj problemaroj de interlingvistiko, kiuj aperis ofte en hungara, esperanta kaj diversaj fremdaj lingvoj, ofte en tre altrangaj fremdaj ĵurnaloj. Lian grandegan laboraron montras la presaĵoj, kritikoj, alparoloj, proponoj kaj raportoj en la tereno de esperantologio, kiuj koncernas ankaŭ la lingvistikajn kaj literaturajn problemojn de ĉi tiu grandan estontecon havanta fako, same, kiel ili respondas la nuntempajn demandojn de la ne-artefaritaj peraj lingvoj.

Ĉi tiu listo de la publikaĵoj enhavas pli ol ducent punktojn. Kiel multaj laboroj, kiel multajn kaj riĉajn spertojn fruktis, la restantaj memoraĵoj, ĉi tiuj artikoloj! Kaj kiom da laboro de li restis nefinita!

Dum sia esperantologia kaj interlingvistika agado Dr. István Szerdahelyi donis valorajn servojn ankaŭ en la tereno de la konigado de nia gepatra lingvo kaj nia nacia kulturo. En Hungario ĉiuj estas la disĉiploj de li en esperantologio kaj interlingvistiko kaj ankaŭ tra la mondo multaj konfesas havi lin kiel majstron. Li estis ordinara membro de la Hungara Lingvoscienca Societo kaj tri eksterlandaj sciencaj societoj. Pro siaj meritoj li ricevis honorigadojn plurfoje kaj gravaj internaciaj organizaĵoj elektis lin inter siajn plej gravajn gvidantojn. Post ĉi tiuj ankaŭ la hejma scienca akcepto ne malfruis: oni nomumis lin universitata docento. Tiam li jam laboris sian kandidatan verkon - ĉi tiun, bedaŭrinde, li ne povis jam fini, kvankam, koninte la temon, la detalaĵojn de la laboro, nepre ĝin estus povinta riĉigi per novaj rezultoj, estus povinta doni novan elanon al la scienco de la interlingvistika kaj esperantologia scienco.

Dr. István Szerdahelyi forpasis en la centjariĝo de la esperanta internacia lingvo. Post unu monato de la memorigado de la centenario de la apero de la unua lernolibro de Esperanto. Sed eĉ en ĉi tiu jaro, kiam li jam povis senti, ke lia forto elĉerpiĝas, per grandega, preskaŭ ĉiujn liajn energiojn forrabinta laboro, li sukcesis fini kaj transdoni al la eldonejo la jam tre forte bezonatan, de li redaktitan hungaran-esperantan mezan vortaron. Ni ne povis scii, ke ĉi tiu libro estos lia lasta libro.

Li apartenis al tiuj maloftaj kaj feliĉaj karakteroj, en kiuj la scio, la pedagogia klero unuiĝis kun la profunda, vera homeco. Lia nomo hejme kaj ĉie en la mondo fariĝis koncepto, la koncepto fariĝis ideo, la ideo de la pura, malfermita homeco, la honesteco, la konsento kaj frateco inter la popoloj kaj nacioj.

Ni adiaŭas la eminentan profesoron de nia universitato kun la bedaŭranta sento pri neanstataŭebla perdo. Tiu perdo koncernas la lingvistikon, en ĝi la sciencon de la interlingvistiko, la instruadon de la internacia lingvo. Ni sincere kunsentas la malĝojon de la familio, la kunlaborantoj, la disĉiploj, la esperanta movado.

La Universitato Eötvös Loránd ne forgesas la memoron de Dr. István Szerdahelyi."

****

## Pri Transilvanio

La infanoj povas lerni en siaj gepatraj lingvoj nur en la elementa lernejo, sed kelkajn studobjektojn ili devas lerni rumane (ekzemple, la historion de Rumanio, la geografion). Ofte okazas, ke ili devas lerni kelkajn studobjektojn rumane, ĉar la instruisto ne konas la gepatran lingvon de la gelernantoj! La nove diplomitajn instruistojn "oni" tiel aranĝas, ke la hungaroj ricevas postenon en rumana distrikto, la rumanoj en hungara distrikto. Por la akcepta ekzameno en la unuan gradon de la mezlernejo, "oni" antaŭe fiksas, kiom da lokoj estas por la rumanoj, kiom da lokoj por la hungaroj. Tiel, pli ol la duono de la gelernantoj lernas rumane nur pro tio, ĉar jam "elĉerpiĝis" la lokoj por la hungaroj. Same okazas en la dua grado de la mezlernejo. Ekzemple inter 18 gelernantoj, nome unu klaso de gelernantoj lernantaj saman fakon, nur unu persono volis lerni rumane! (Tio estas vera ekzemplo!). Ĉi tiuj gelernantoj jam ne plu volas lerni, sed la dek du klasoj estas devigataj viziti, nur pro tio ili ne forlasas la lernejon.

En Rumanio oni jam ne plu povas lerni en altlernejoj hungare, kaj ne estas ebleco viziti la similan universitaton de la "amika" Hungario, kie ĉi tiuj gelernantoj povus lerni hungare. (La skribitaj faktoj validas en la distrikto Hargita, pli precize en urbo Sékejudvarhej (Székelyudvarhely), ĉar ĝi estas perfekte hungara urbo! Estas tre malfacile akiri pasporton, pli ol tri monatojn oni devas atendi ĝin. Oni povas ricevi nur unu permeson al la vizitado de Hungario, kie ĝenerale oni havas parencojn, ĉar la vojaĝantoj ne povas ŝanĝi rumanan monon al hungara mono! Konate estas, ke ĉe la dogano oni ne permesas porti en Rumanion libron, ĵurnalon, gazeton, fakĵurnalon! Se tamen iu portos tiaspecaĵon, la doganistoj simple forprenos ĝin! En Hungario la malmultegaj rumanoj havas apartan gimnazion kaj ankaŭ ĉiujn aliajn etnajn minoritatojn la hungara ŝtato preskaŭ allogas gardi siajn naciecojn! En Slovakio la muzeo falsas la historion. En la fortikaĵo Budetin, kiu estis ĉefbazo de la hungara liberecbatalo en la XVIII-a jarcento, kaj ĝis 1920 apartenis al Hungario, kaj vivis tie hungaroj, nun la muzeo aranĝis ekspozicion por la slovakaj "dratumistoj", kaj la "historia" parto de la ekspozicio parolas nur pri la "slovakoj, vivantaj en ĉi tiu parto de Slovakio", en la mezepoko! Eĉ la hungarlingvaj skribaĵoj de la ekspozicio estis nomitaj "slovaka kulturo"! La gardistino de la muzeo eksciinte, ke venis hungaraj vizitantoj, ne volis permesi al la hungaroj eniri la "historian ekspozicion"! Same en vilaĝo Krasnjanin(Kraszna). Ĝi estis posedaĵo de hungaroj, kaj la kasterlo apartenis al hungara posedanto. Nun tie funkcias muzeo, parte historia. Ĝi enhavas multajn portretojn, - sen subskriboj, ĉar ĉiuj ili montras hungarajn personojn. La historio de la kastelo ne estas skribita, nenio montras, ke ĝi estis hungara posedaĵo. La nomoj de la stratoj kaj urboj, vilaĝoj, troviĝas skribitaj nur en la slovaka lingvo en la laste menciitaj du lokoj, kvankam multaj hungaroj vivas tie. Ankaŭ en urbo Komarno (Komarom) ĉiuj stratoj estas skribitaj nur slovake, kvankam ĝi estas perfekte hungara urbo. Pasintjare okazis, ke nokte malaperis la slovakaj nomoj de la stratoj kaj ĉiuj estis pentritaj hungare. Neniam iu eksciis la "kulpinton", sed la pentraĵoj oficiale neniigis kaj restarigis la slovakajn nomojn.

sensubskriba dokumento

****************************************************************************

Por tiu ĉi L! malsanis kaj la ofsetilo kaj la ofsetulo. Pardonu pro l'fuŝaĵoj!

**La venontan numeron, fine de marto, ricevos nur la (re)abonantoj. Bonvolu atenti, lastpaĝe de ĉi tiu n-ro, ĉu vi ne forgesis aranĝi vian reabonon.**



## 43a Kongreso de SAT-AMIKARO

**2, 3, 4, 5-ajn de Aprilo 1988**

**Ecole Normale Mixte, 81000 ALBI - Francio**

**O.K.K.** : Kdo ARNAUDET R., 40 rue Ingres, F 81000 ALBI
**Kasisto** : Jean COSTES, à Rieucourt, TERSSAC, F - 81150 MARSSAC. Poŝtkonto: Toulouse 4420 21 Z
**Kongresejo kaj akceptejo:** Ecole Normale Mixte, rue de l'Ecole Normale, 81000 ALBI. La akceptejo ekfunkcios la sabaton je la naŭa horo.

**Loĝejo :**
- En la albiĝaj hoteloj. Pro la kosto de la unupersonaj ĉambroj ni preferis ĉambrojn por du personoj. Do se vi estas sola, informu nin pri la kamarad(in)o kiu akceptus tranokti en sama ĉambro. Ni sendos al vi planon de la urbo kaj eventuale ni akompanos vin ĝis la hotelo.
- En tendumejo kaj ruldomejo. La albiĝa kampadejo funkcios sed ĝi staras ekster kaj aliaflanke de la urbo, proks. 3 kilometrojn de la kongresejo.

**Programo :**
Okaze de la kongreso estiĝos ĝemeligo inter E-grupoj **Ĝirona Espero** (Hispanio) kaj **Tarn-Esperanto.** Kandidatoj por la Atesto pri Praktika Lernado kaj Atesto pri Kapableco (F.E.I.) sin anoncu kiel eble plej frue, antaŭ la 15a de marto. Krom la laborkunsidoj okazos prelego "L'Académie de l'Esperanto, fondation et rôle essentiel" (D-ro Albault, franclingve), prezentado de filmoj, distra vespero kun okcitana grupo kaj ekskursoj:
- duontaga: vizito de la malnova urbo, de la fama katedralo kaj de la mirinda muzeo Toulouse-Lautrec.
- tuttaga: Cordes, Puycelci, Castelnau de Montmiral, rondvojaĝo de la mal-novaj kasteloj aŭ urbetoj, kun halto ĉe vitkulturisto.

**Kongreskotizoj:**
Membro de SAT-Amikaro: 100 FF. Gasto: 140 FF (Samfamilianoj pagos duonkotizon). Junul(in)o (15/25-jara): 50 FF.
**Pensiono por 3 tagoj** :(3 tranoktoj, 6 manĝoj, 3 matenmanĝoj)
Loĝado en hoteloj sufiĉe komfortaj : 580 FF
Matenmanĝoj en la hoteloj - nur komunaj manĝoj (6) en la lernejo: 300FF
**Ekskursoj** :Duontaga: 15 FF. Tuttaga (+ tagmanĝo): 150 FF
**Kongresmarkoj:** Folio da 20 : 5 FF

**Petu kongresaliĝilon al la kasisto, aldonante respondkuponon aŭ 2,20 FF-poŝtmarkon.**

# Ekde ĉi-somere, denove, E-renkontiĝoj por ge-Laŭtuloj en Beauville, Lot-Garonio Francio

**Periodo** : de la 30a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1988
(kiuj deziros, tiuj povos alveni pli frue aŭ/kaj foriri poste)
**La loko** : "Moulin de Carque Sac", F - 47470 BEAUVILLE. Temas pri malnova akvomuelejo en 8-hektara bieno kun rivereto, herbejoj, arboj en trankvila, kampara valo 25 km.-ojn nordoriente de AGEN, en sudokcidenta Francio. Proksima stacidomo: LAROQUE (je 10 km), kie ja sidas la "Laŭtejo". Tie jam okazis plurfoje someraj sukcesaj renkontiĝoj, kaj tiuokaze naskiĝis "**laŭte!**" antaŭ 12 jaroj. Tiun bienon Solanĝa kaj Kribo deziras disponigi jam ekde ĉi tiu somero por E-renkontiĝoj por la geamikoj de L!, de "Mondhejmo", de la Amika Reto de SAT, kaj por similaj afinecaj amikoj, eĉ E-komencantoj, kiuj povos tie praktike eklerni la lingvon.
**Loĝado** : La tereno taŭgas por tendoj, ruldomoj, sed ankaŭ homoj kun nuraj dormsakoj estos bonvenaj : ili povos tranokti ŝirmite en la iom post iom loĝebligataj konstruaĵoj.
**"Programo"** : Laŭ formulo simila al tiu uzata en L!, la programo konsistos el ĉiuj proponoj de la partoprenontoj. Ĉiu havas ja fakon aŭ hobion pri kiu ŝi-li pli-malpli kompetentas, kaj povas prezenti ĝin al aliaj partoprenantoj. Eblos krome ekskursi, botanikumi, ludi, muziki, kanti, sin bani, broŝurumi, verki por L!, debati... eĉ labori por pliagrabligi tiun renkontiĝejon, en kiu estas bonvenaj ĉiuj pretaj vivi simple, et-koste, en amikeca, harmonia etoso.
**Manĝoj** : Laŭ ĉies deziro, eblos ~~organizi~~ inter la partoprenantoj komunaj aĉetado kaj preparado de la manĝoj (plurfoja sperto montris la avantaĝojn de tia aranĝo), sed ankaŭ individuistoj povos aparte elturniĝi. Estos surloke kuirfornoj, kaseroloj, teleraro... Eta regulo: ne fumi en la konstruaĵoj.
**Peto** : Kiuj intencas ĉeesti, eĉ ne longe, tiuj bv. sin anonci plejeble frue, indikante kion ili proponas por mem partopreni en la "programo". Uzado de la loko estos senpaga, do neniom antaŭpagi.
En venonta L! aperos pliaj detaloj kaj listo de la unuaj sinanoncintoj kun la sugestoj jam prezentitaj.
Por aliĝi aŭ informpeti :
S. kaj K. Baudé, F 47340 LAROQUE

---

**Tiu ĉi kruco signifas, ke L! ankoraŭ ne ricevis vian reabonon! Dankon pro la "ordigo"!**

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP n° 58651